

# ASISTILO

n-ro 16

Vintro 1994-95 Hiver

Revue de religion comparée bilingue (espéranto et français) / Religikompara revuo  
 Association Internationale d'Etude des Enseignements Spirituels et Théologiques  
**ASISTI / Asocio de Studado Internacia Pri Spiritaj kaj Teologiaj Instruoj**  
 Membro-grupo de IARF (*International Association for Religious Freedom* / Intern. Asocio por Religia Libereco)  
 Neŭtrala asocio kunlaboranta kun TEL. (Tutmonda Ekumena Ligo), JBLE (Japana Budhana Ligo Esperantista),  
 WCRP (*World Conference on Religion and Peace* / Monda Konferenco pri Religio kaj Paco), kaj U.E.A.



## Jogo, pratempa ?

Pli ol 4000-jaraĝa bakittera sigelo el *Indusa civilizacio* prezentanta homon sur dion sidantan en joga pozicio.



## PASKO estas por mi ...

unuigi kun la ora universala LUMO,  
 spirite relevigi kiel brilanta kaj pura KRIST-ALO,  
 ekflamigi la dian FAJRERON en mia koro,  
 starigi PACON inter ni, INFANOJ DE DIO.

Anton Schaffer (Aŭstrio)

## Vorto de la redaktoro

Bonan jaron al ĉiuj ! la jaro de la toleremo ...kiun mi do petas de vi pro la malfrueco : la UN-a, samtempe kiel la kristana jaro de longe komenciĝis, la 5755-a jaro post la kreado de l' mondo ankoraŭ pli frue por la judoj, la 4692-a ĉina jaro la 31-an de januaro, la tibeta jaro de Ligno-Porko la 2-an de marto, kaj la bahaa samtempe kiel printempo : post nur du tagoj !

Toleremo estas do nia ĉefa temo dise en ĉi tiu tuta numero. Plie ni ankoraŭ festas kelkajn lastjarajn datrevenojn : 500-a de F. Rabelezo, 350-a de William Penn, 300-a de Voltero...

Kvankam jam preskaŭ malfruas ne maltrafu la 2-an *Interreligia Seminario Esperantista* organizitan de Eva Farkas kaj Erika Toth nome de ASISTI en Szombathely (H) : vidu la aliĝon sur lasta pago. Se vi ne povos veni, tamen partoprenu sendante kontribuadon por la seminaria broŝuro (teoria limdato 1-4-95 !, vidu p.12). Do, ĝis tre baldaŭ, almenaŭ por kelkaj el vi. (...La aliaj ne forgesu reboni !)

**ASISTI-Ligila Organo** : Asocio de Studado Internacia pri Spiritaj kaj Teologiaj Instruoj - (ĉirkaŭ trimonata)  
**Red.** : "Presbytere", F-09800 Balagué (Tel +33 61 04 70 66)  
**ASISTI-estraro**: Yosimi Umeda : prez., Ch. Lavarenne : sekretario, Bradio Moro : kasisto, Bernhard Westerhoff kaj Eva Farkas-Tatar : kunvenoj, François Degoul : eksteraj rilatoj, P-ro Leif Nordenstorm : Religia Antologio.  
**Directeur de Publication** : Ch. Lavarenne (adr. ci-dessus).  
**Jarabono**: triono de UEA-individa abono (MA) : 100 ff / 32gld / 29DM / 18\$ (duonpreze por malriĉaj landoj), al :  
 - franca poŝtkonto "Asistilo, n-ro 10 421 77 R Marseille"  
 - UEA-konto "asis-r"  
 - FEL-konto "elvr-n"  
 - norvega poŝtgiro : "Ch. Lavarenne n-ro 0540-7849940"  
 - Marek Krainiski, ul. Albanska 28/2, PL-60 134 Poznan.  
**Subtena abono** : ekde 150 ff / 50 gld / 50 DM / 30 \$ ...  
**Abonhelpa fonduso** : pliaj abonoj laŭ la tarifo valida por vi mem ; vi povas indiki adresojn de dezirataj ricevontoj.  
**ASISTI-kotizo 1995** : deviga por esti membro, kia ajn ĝi estu (sed minimume kvarono de la UEA-"MJ" : 9,5 gld, por okcident-Eŭropo, norda Ameriko, Japanio...)  
**Subtena membro** : ekde 200 ff / 70 gld / 70 DM / 40 \$ ...  
 ... Ne forgesu kontribui, koran dankon !

## Enhavo

Ĉies rajto sekvi sian konsciencon, de Breno Chenu (F)	3
Pri FVG, Fakultato por komparaj religisciencoj en Antverpeno, de Lydia Kerremans (B)	3
Komuna preĝo de katolika kaj ortodoksa episkopoj en Serbio	3
Ĉu baldaŭ kardinalinoj ? laŭ deziresprimo de M-ro Ernesto Kombo (Kongolo)	4
Pastroj havu rajton edzigi, de Rita Waschbüsch, Centra Komitato de la Katolikoj (D)	4
Maltolerata episkopo : M-ro Jakobo Gaillot (F)	4
Abba Ŝenuda III-a, Papo de la Kopta Eklezio, intervjuita de D. Ammun (Egiptio)	4
Trad. de la <i>Jogosutro</i> de Patañjali (IV-a jc. a.K., Bharato), de anonimulo kaj de la red.	5
Intervjuo de la kontraŭleĝe mortkondamnita verkistino Taslima Nasrin (Bangladeso)	8
Alvoko por la minacata afrika kulturo, de M-ro Paride Taban (Sudano)	8
Honrajtoj en Islamo, de WAMY : Monda Asembleo de la Islama Junularo (Saudi-Arabio)	8
Nereligia milito, laŭ Patriarko Aleksij la II-a kaj la granda Muftio de Grozni (Ĉeĉenio)	8
La Abatejo de la Deziro, de F. Rabelezo, okaze de lia 500-a naska datreveno (F)	9
Difinoj de religiaj terminoj, de Robert Traer (IARF), trad. de Mike Sadler (GB)	12
Potala ĉine restaŭrita kaj monaĥejoj ĉirkaŭitaj de la armeo en Tibeto	13
Raportoj pri IRKE kaj ASISTI-kunveno en Seŭlo, de la ASISTI-prez. Y. Umeda (J)	14
Raporto de Ulrich Matthias (D) pri Katolika tendaro en Sebranice (Ĉeĥio)	14
La Serĉado de l'Sankta Gralo (romanika romano el la XIII-a jc.) - sekvo	15
Mesaĝo al WCRP, de internacia kolokvo pri Montségur (Okcitanio)	18
Al komuna etiko, de WCRP-komisiono "Izoleco kaj indiferenteco" (Riva del Garda, I)	18
Agado de la sekretario ĉe la 6-a Monda Sesio de WCRP en Vatikano kaj Riva (I)	19
Preĝo al Dio kaj filozofia letero de Voltero pri William Penn (GB/Usono)	20
Tiel mortis Abraham Halter, presisto en Varsovio (PL)	22
Majaa legendo pri la kreado (Majalando)	24
Falo de la homaro kaj kreado de la mondo laŭ "Moderna Rozokruco", de J. G. Ibars (E)	27
Recenzo pri la bonaj mesaĝoj de Jesuo, trad. de Gerrit Berveling (NL)	26
Taoismo en Kolombio	28
Nuntia ex Silesia a. MCMXCIV <sup>o</sup> , de ASISTI-kasisto Bradio Moro (Usono/PL)	29
Leteroj: R. C. Peries (Srilanko), Mike Sadler (GB), E. Marzola (I), G. Tréanton (F)	29
Granda Unueca Kredo, de Jebumo (Cinio) - sekvo	30
Anoncoj: Spiritaj mesaĝoj, Japana budhano, novaj revuoj Kosmos (D) kaj Agape (PL)	31
Aliĝilo al la Paska 2-a Interreligia Seminario Esperantista, en Szombathely (H)	32
La Papo denove parolis en esperanto : Alvoko, sendita de G. Pirlot (B)	32

# 1995 : UN-a "Jaro de la Toleremo"

## Cies rajto sekvi sian konsciencon

Dank'al la Unuigintaj Nacioj ni nun estas en la jaro de la toleremo. Laŭ la novaĵoj, ne certas ke ni klare ekkonsciis pri tio ĉi ! Sed bona tamen estas la okazo pripensi pri termino kiu famiĝis en la franca nur ekde la tempo de la religiaj militoj (fine de la XVI-a jc.) (...)



Ni konfesu ke tolerema sinteno ne necese vekas simpatian. Ĝi povas esti suspektata pri moleco kaj varmeteco. Ĝi prosperas sur la humo de la konvinko-manko kaj vol-malforto. Ĝi havas la virteton de la lanugaĵo, kiu mildigas la batojn sen havi pli noblan celon. Ĝi finfine estus ver-estingilo, konscienco-anestezilo.

Tial ja la plej urĝa afero estus malpli la disvolvado de toleremo ol la denuncado de la maltolerbla. Ĉu oni povas "toleri" la operacojn de etna purigado ? (...) Tro da religiaj fanatikismoj rigardataj kiel poridentecaj, enhavas gravajn damaĝojn kontraŭ la rajto de la personoj kaj de la grupoj. La indulgaĉo kiu povas fariĝi komplaceco, havas tro da zelotoj.

Se do oni deziras situigi la toleremon en moralagmaniero, oni certe devas komenci per bona precizigo de ĝia kampo, fiksado de ĝiaj limoj, kaj ne tro postuli de ĝi. Ĝi ne estas la difino de la tuta rimedaro de la etiko de la interhomaj rilatoj. Ĝi nur indikas kondiĉon por eki, rimedon, necesan unuan paŝon.

Ĉar oni devas ekkonscii ke la toleremo funkcias rilate al sinteno kiun oni rigardas mem kiel for de la vero. Ni ne toleras bonon, sed manieron serĉi la veron, kiu disiĝas de la nia. Pro tio ĉi, gravas la toleremo sur la religia kampo, kaj ties disvolviĝo en la rekono de ĉies netuŝebla rajto sekvi sian konsciencon.

Interese estas noti ke la pripensado de la dua Vatikana Koncilio pasis de la temo "toleremo" al la temo "religia libereco". La toleremo ne estas pasiva virto sed akcepto de la aliulo en ties eminenta digno kaj ties nereduktebla diferenco. Ĝi transportas tiun ĉi por pli bona reciproka kompreno. Ĝi devus plifaciligi la kunfrontadon de la vidpunktoj. Ĝi estas do kondiĉo de la vivo en socio, helpante pacan kunvivadon. Ĝi staras sur la konvinko ke ĉiu estaĵo partoprenas en la regno de la vero, eĉ se ĝia vojo konsternetas nin.

Longe, en katolika medio, oni akuzis la toleremon pri tio ke ĝi preparas lokon por la eraro, aŭ almenaŭ por la indiferenteco. En plurisma konteksto, la koncilio klare asertis en sia Deklaracio pri la religia libereco (n-ro 1) : "La vero ne altrudiĝas alimaniere ol per la forto de la vero mem".

Bruno Chenu\*

\* El "La Croix", 24-2-95, p.20.

## Anticipa malfermo ĉe FVG

Antverpeno, 6-10-1994. - "La Fakultato por komparaj religisciencoj estas pli ol instruinstiucio. Ĝi deziras plie aktivigi la interkomunikadon kaj kuraĝigi pli da toleremo. Ĝi volas igi la mondon pli loĝebla kaj vivinda, kreskigi reciprokajn komprenemon kaj veki la atenton por la riĉeco de la diversaj vivokonceptoj." Tiel rabeno J. Rosen, prez. de FVG, malfermis la akademian jaron 94-95 en ĉeesto de reprezentantoj de islamo, kristanismo, budhismo, hinduismo kaj humanismo.

En sia akademia parolado, la dekano Shitoku A. Peel analizis la interreligian dialogon inter budhismo kaj kristanismo. La reciproka intereso de kaj por religioj estas laŭ li freŝdata fenomeno. La unuaj spuroj datiĝas el la 17-a jarcento kaj pliprofiligiĝas en la 18-a jarcento, sed nur en la norda kaj okcidenta Eŭropo. Ĉi tie ĉiam denove reaperas du alirpunktoj : la filozofia starpunkto kaj la esploro de la misiistoj kies intereso precipe konsistas el konvertado pli ol el kono.

La unua, vera klopodo por interparoli okazis "hazarde", en 1893 en Chicago (cikago, Usono), laŭdiras dekano Peel. Tio ĉi estis la ekiro por ĉiuj postaj interreligiaj kaj ekumenaj organizaĵoj kaj kontaktoj. Tamen ni atendu ĝis post la 1-a mondmilito por "vera, konstanta reciproka intereso de kaj por religioj kun interparolantoj kiuj traktas unu la alian je sama nivelo". Plie, la estiĝintaj kontaktoj ne ĉiam ŝajnas pozitivaj, rimarkis la dekano. Tiel, en Mezoriento reaktiviĝis konfliktoj en kiuj la religio ludis rolon nenegeblan.

En la jaroj 1950-aj oni malkovris ke malamiko "laŭdoktrine povas esti same interesa kiel amiko koncerne religikomparado". Tio rezultis en ekflorado de kvazaŭ-dialogoj inter kristanismo kaj judismo, inter kristanismo kaj budhismo...

Ĉefpunkto de kristana-budhisma dialogo troviĝas en Pacifiko, ĉe la Fakultato pri religio de la Havaĵa universitato (...) Kvankam tiuj ĉi interparoloj komence sukcesis, la intereso malpliigiĝis, ekde la jaroj 1980-aj, pro la konscio "ke fakte oni turniĝadas en fermita, elita cirklo", kaj "ke la interparoloj nur malmulte influis la bazon de la kristana kaj budhisma popoloj, kiuj restis same nekonsolataj kaj malamikaj unu al la alia".

Lydia Kerremans

## Malfermo en Serbio

La antaŭtagon de la nova jaro, la serba ortodoksa episkopo de Sabac-Valjevo predikis ĉe la Sankt-Silvestra meso prezidita de la katolika ĉefepiskopo de Beogrado, M-ro Frank Perko. Dum sia interveno, M-ro Trifunovic preĝis por reamiĝo de la popoloj kaj de la eklezioj. La partopreno en katolika ceremonio de la serba prelado, kiu ankaŭ estas membro de la ortodoksa Sankta Sinodo, havas specialan gravecon : 96 % el la loĝantaro de lia urbo, Valjevo, estas ortodoksa.

(Fonto : CIP, laŭ La Libre Belgique, 17-1-1995, p.7).

# "Jaro de la Toleremo", en kristanismo ?

## Ĉu virinoj tolerotaj en Katolika Eklezio: baldaŭ kardinalinoj ?

M-ro E. Kombo, episk. de Owando (Kongolo), proponis en ĉeesto de la Papo (10-10-94), ke virinoj povu eniri en la Sanktan Kolegion de la Kardinaloj (kiu elektas la Papon) : "Dio povu inspiri la profetan konduton kiun konsistigus la kvanta same kiel kvalita nomumado de virinoj al postenoj de respondeco, eĉ al la plej altaj postenoj de la hierarkio, kiel laikaj kardinalinoj."

Tio okazis dum seanco de la sinodo de la episkopoj pri la religiula vivo. Estas en la mondo ĉ. unu milono da katolikaj gereligiuloj, el kiuj la 3/4 estas virinoj. Kiel respondo, post du tagoj la papo asertis dum sia ĉiusemajna ĝenerala aŭdienco, ke Jesuo-Kristo estis ĉe la origino de la "promocio kaj liberigo de la virino". Sed li ne konfidis al ili la saman mision, sacerdotan, ol al la apostoloj.<sup>1</sup>

Germana teologo, P-ro Norbert Greinacher, kritikis la roman rifuzon ordini virinojn. Sed li nun riskegas perdi la rajton instrui nome de la Eklezio kaj do sian postenon ĉe la Fakultato en Tübingen kiel okazis por Hans Küng. N. Greinacher ankaŭ kvalifikis la sukceson de E. Drewermann<sup>2</sup> "ŝanco por la germana Eklezio" kaj la (ĉi-malsupran) sankcion kontraŭ M-ro Gaillot<sup>3</sup> "arbitra ago". Sed la ĉefa motivo estas lia deziresprimo ke Johano-Paŭlo la II-a plej rapide eksigu "en la intereso de la unueco de la Eklezio".<sup>4</sup>

## Ĉu edzeco kaj edzigo tolerotaj por pastroj ?

Antaŭ kelkaj monatoj la Centra Komitato de la germanaj katolikoj, ZDK, publikigis dokumenton kiu mirigis. Ĝi petis ke la Eklezio ĉesigu sian devigon de needzigo por la pastroj kaj akceptu sacerdotigi edzigitajn virojn (...) R. Waschbüsch, ZDK-prezidantino kaj eksa vicministro-prez. de Sarlando klarigas : "Ni ne feras kampanjon kontraŭ la senedzineco de la pastroj. Ni volus ke la pastro havu rajton libere elekti ĉu edziĝi aŭ ne."<sup>5</sup>

## Maltolerata episkopo<sup>3</sup>

M-ro Jakobo Gaillot, episk. de Evreux (apud Parizo) estis nomumata (13-1-95) episkopo *in partibus* de Partenia (malaperinta diocezo de Maŭritanio), perdante do ĉian postenon. La kontestantaj katolikoj de la revuo *Golias* anoncis la fondon en Liono (15-1-95) de Kunordigaĵo por pli da Libereco en la Eklezio (CLE). "Kio faligis Jacques Gaillot, tio estas la malkapablo (de la Eklezio) dialogi kun la moderneco", asertis Ch. Terras.<sup>6</sup>

1/ Henri Tincq en *Le Monde*, 14-10-1994, p.13.

2/ Vidu Asistilon n-roj 11 p.8 kaj 13 p.13.

3/ Vd ankaŭ art. de Cherpillod en *La Kancerkliniko*, p.11.

4/ Elisabeth Auvillain, *La Croix*, 22-2-1995.

5/ Henri Tincq, *Le Monde*, 1-3-1995, p.14

6/ Direktoro de la revuo *Golias*, en Liono.

## En la Kopta Eklezio

Lia Sankteco Abba Ŝenuda la III-a, "Papo de Aleksandrio kaj Patriarko de la Predikado de Sankta Marko", posteulo de la apostolo kaj ĉefo de la Kopta Eklezio de post 1971, unuafoje venis al Francio, por konsekri preĝejon apud Parizo.



La nomon "kopta" (el la araba *qubt* : "egipta") ricevis tiu Eklezio en la V-a jc., kiam ĝi apartiĝis de la Granda Eklezio<sup>1</sup> : pro fideleco al Sankta Cirilo<sup>2</sup> ĝi rifuzis kristologiajn difinojn de la Kalcedona koncilio kaj estis akuzata pri monofiziteco<sup>3</sup>.

- Ĉu via vojaĝo ankaŭ havas politikan flankon ?
- (...) Mi ne estas politikulo sed spirita gvidanto.
- Kiom da koptaj fideluloj estas en Egiptio ?
- Ĉirkaŭ 8 milionoj da animoj.
- Sed la oficialaj statistikoj mencias nur 3.
- Niaj pastroj havas kiel taskon viziti kaj helpi la familiojn. Ni tre bone konas niajn komunumojn.
- Kiel vi taksas la spiritan vivon de via eklezio ?
- Ĝi estas riĉa kaj profunda. Ni havas sep seminariojn en Egiptio, monaĥa vivo estas floranta. (...) Nia Eklezio nombras 58 preĝejojn en Usono, 14 en Kanado, 38 en Eŭropo, 21 en Aŭstralio, kaj ankaŭ en la arabaj landoj (Libano, Kuvajto, Irako...) Ni estas ĉie aktivaj, ankaŭ por ekumenismo.
- Kiaj estas viaj rilatoj kun la islamanoj (...) ?
- Distingendas moderaĵ kaj fanatikaj. La moderaĵ islamanoj estas niaj amikoj, niaj fratoj, kaj ni vivas en bonegaj rilatoj kun ili. La fanatikuloj, la teroristoj (...) volas regi la landon laŭ sia propra koncepto pri ŝaria (korana lego), kiu estas malakceptata de la aŭtenta islamo. Kun la religiaj ĉefoj ni flegas tre amikajn rilatojn : ĉi-jare, mi organizigos kiel kutime honoran kunvenon ĉe la patriarkejo kaj mi ricevos kiel invititojn la ĉefministron kaj plurajn registaranojn, la muftion de la Respubliko, la rektoron de Universitato Al-Azhar ...

D. Ammun, Kairo (en *La Croix*, 11-2-95)

1/ Tiel nomita por la periodo ĝis la *Orienta Skismo* (1054).

2/ Patriarko de Aleksandrio de 412 ĝis 444.

3/ Renkonto kun Paŭlo la VI-a en 1973 malaperigis la dogman malkonsenton pri tio ĉi, car temis nur pri lingva miskompreno. Malkonsentoj restas pri purgatorio, elpensita en la mezepoko, detalaj demandoj pri Maria kaj la *Filloque*. Plie la koptoj akceptas divorcon kaze de adulto kaj, kiel la aliaj ortodoksuloj, rifuzas la ĉefecon de la roma papo.

# Jogosutro de Patañjali

*Enkonduko de la anonima tradukinto* : " Jen tradukprovo de la Jogosutro de Patañjali (patanĝali). Tiu ĉi esenca mesaĝo transcende brilas tra la jarcentoj, kiel pura spiritala juvelo : trezoro de la homaro. Jen fidinda gvido sur la Vojo, invito al meditado, al intima revelacio, instigo al radikala evoluado por ĉiu. "

## Historia enkonduko pri la teksto

La unua atesto de joga praktiko estas tera sigelo el la 3-a jarmilo antaŭ Kristo, apartenanta al la "Indusa civilizacio" (de Mohenjo-Daro). Ĝi prezentas homon (aŭ dion ?) sidantan en joga pozicio\* (...)

La jogo (literature) aperas unuafoje kiel memstara fako en kelkaj el la plej fruaj Upaniŝadoj (ĉ. la 8-an jarcenton a.K.), kie ĝi troviĝas kiel tekniko celanta liberigi la animon de la turmentoj de la samsāra (ekzistofluo, senfine daŭranta trans la mortojn). (...)

Kion ni scias pri la vojo sekvita de la Mahavīra (kromnomita Ĝino, "venkinto", la fondinto de ĝinismo, 8-an jarcenton a.K.) kaj de la Budha (fondinto de budhismo, 7-an jc. a.K.), tio montras ke tiuj ĉi homoj, certe samaj kiel tiom da aliaj kies nomoj ne alvenis ĝis ni, praktikis jagon tre similan al tiu de la klasika tradicio.

La fundamenta teksto priskribanta la hindan klasikan jagon estas atribuita al Patanĝali, pri kiu oni scias nenion. Li eble vivis en Panĝabo ĉ. la IV-an jarcenton a.K., en brahmana medio, sed la doktrino kiun li prezentas, la praktikoj kiujn li priskribas, estas multe pli malnovaj. La verko de Patanĝalio estas nura serio de sanskritaj aforismoj, la Jogosutro, kiu faris la sukceson de la jogo dum jam preskaŭ 25 jarcentoj.

(...) La aliaj verkoj pri tiu ĉi objekto ĉiuj estas, aŭ preskaŭ ĉiuj, komentarioj pri tiu ĉi baza verko. Ĝi estas nomita Jogosutro ĉar ĝi prezentigas en formo ne de vera traktato, kie la traktado apogigas sur demonstroj, sed de sinsekvo de aforismoj interligitaj kiel kolieraj perloj (*sūtra* unuasence signifas "fadeno"). La aforismoj estas do kvazaŭ titoloj de ĉapitroj kies teksto mankus, aŭ unufrazaj resumejoj de

lekcioj prezentotaj laŭ progresado kies neceseco estas preskaŭ tute nekaptebla de la hodiaŭa homo ; fakte tiuj koncizegaj frazoj estis memorigataj de la studentoj kaj komentariataj de la majstro, kun akompano de praktikaj ekzercadoj.

(...) Necesas do legi la Jogosutron kun la klarigoj liveritaj de Vyāsa (II-an jc. a.K.??\*) (...) Tiu ĉi unua komentariisto tre precize sekvas la tekston, kaj ŝajnas ke li reflektas la penson de Patanĝali mem (...)

Prof. Jean Varenne\*\*\*

\* Vidu ties foton sur la titol-paĝo de la revuo.

\*\* Notu bone la demandosignon de la aŭtoro mem, kiu post tri jaroj (en 1975) skribis pri li : " Flanke de la mita Vjaso (mita aŭtoro de la Vedo kaj de la grandaj hinduaj epopeoj kaj ĉiuj Puranoj), la tradicio mencias alian verkiston, tiun ĉi probable historia, kiu, ĉirkaŭ la komenco de la kristana erao, verkis faman komenton de la Jogosutro. "

Kaj alia mondfama universitata hindologo kaj sanskritisto, Louis Renou, proponis en 1951 kiel daton por la sama aŭtoro : ĉirkaŭ la VIII-a jc post Kristo ! Ni preferas do ne enmiksiĝi en tiu ĉi sciencula diskuto.

\*\*\* Tiam instruanta ĉe la Provenca Universitato. Temas pri sintezo de artikoleroj en *Encyclopaedia Universalis*, ĉefe vol. 12, 603b (art. "Patañjali"), kaj vol. 16, 1029c kaj 20, 2056a, plus el lia libro "Le yoga et la tradition hindoue", Paris, C.A.L., 1973, p.207.

## Letero de la redaktoro al la tradukinto

(...) Temas pri moderna versio kiu kalkulas kun la nuntempa okcidenta evoluo (psikologio ktp.) kaj kun la kompreno kiun havas pri ĝi la eŭropaj joganoj. Ĝi estas sintezo de la okcidenta tradicio (kiu probable jam esprimas 2- aŭ 3-generacian sperton). Via teksto havas sian propran valoron, pro ĝia beleco kaj pro tio ke ĝi samtempe reflektas kion vi sentas en la profundo ; kio gravas, tio estas la spirito kiu emanis el ĝi : tio kion vi perceptas de instruo kiu ĉiukaze transcendas ĉiujn alproksimigojn kiujn oni povas fari al ĝi, dum oni ne estas alveninta al la fino de la vojo ( kio estas la kazo de ambaŭ ni ...kaj la kazo de probable ĉiuj okcidentaj tradukintoj ! ) .

Via alproksimigo, spirita, estas do tute same valora laŭ mi, se ne pli, ol mia alproksimigo, ni diru "gramatika". Kaj tute en la spirito de Asistilo estas provi oferti pri io almenaŭ du malsamajn vidpunktojn.

I.  
समाधिपादः

1 अथ योगानुशासनम् ।	10 अभावप्रत्ययालम्बना तमोवृत्तिर्निद्रा ।
2 योगाश्रितवृत्तिनिरोधः ।	11 अनुभूतविषयासंप्रमोषः स्मृतिः ।
3 तदा द्रष्टुः स्वरूपेऽवस्थानम् ।	12 अभ्यासवैराग्याभ्यां तन्निरोधः ।
4 वृत्तिसारूप्यमितरत्र ।	13 तत्र स्थितौ यत्नोऽभ्यासः ।
5 वृत्तयः पञ्चतयः क्लिष्टाक्लिष्टाः ।	14 स तु दीर्घकालनैरन्तर्यसत्कारादरासेवितो दृढभूमिः ।
6 प्रमाणविपर्यय विकल्पानिद्रास्मृतयः ।	15 दृष्टानुश्रविकविषयवितृष्णस्य वशीकारसंज्ञावैराग्यम् ।
7 प्रत्यक्षानुमानागमाः प्रमाणानि ।	16 तत्परं पुरुषख्यातेर्गुणवैतृष्ण्यम् ।
8 विपर्ययो मिथ्याज्ञानमद्रूपप्रतिष्ठम् ।	17 वितर्कविचारानन्दास्मितारूपानुगमात्संप्रज्ञातः ।
9 शब्दज्ञानानुपाती वस्तुशून्यो विकल्पः ।	18 विरामप्रत्ययाभ्यासपूर्वः संस्कारशेषोऽन्यः ।

samādhi-pādah

- 1 atha jogānuśāsanam / (1)
- 2 jogas citta-vr(i)tti-nirodhah / (2)
- 3 tadā draṣṭuḥ sva-rūpe 'vasthānam / (3)
- 4 vr(i)tti-sārūpjam itiratra / (4)
- 5 vr(i)ttajah pañcatajjah kliṣṭākliṣṭāh / (5)
- 6 pramāna-viparjaja vikalpa-nidrā-smr(i)tajah / (6)
- 7 pratjaksānumānāgamāh pramānāni / (7)
- 8 viparjajo mithjāgñānam atad-rūpa-pratiṣṭham / (8)
- 9 śabda-gñānānupāti vastu-śūnjo vikalpah / (9)
- 10 abhāva-pratjajālambanā tamo-vr(i)ttir-nidrā / (10)
- 11 anubhūta-viśajāsampromośah smr(i)tiḥ / (11)
- 12 abhjāsa-vājrāgjābhjām tan-nirodhah / (12)
- 13 tatra sthitāu jatno 'bhjāsah / (13)
- 14 sa tu dirgha-kāla-nājrantarja-satkārādarāsevito dr(i)dha-bhūmih / (14)
- 15 dr(i)ṣṭānuśravika-viśaja-vitr(i)ṣṇāsja vāsikāra-samgñā vājrāgjam / (15)
- 16 tat param puruṣa-khjāter guna-vājtr(i)ṣṇjam / (16)
- 17 vitarka-vicārānandāsmitā-rūpānugamāt sampraṅgñātah / (17)
- 18 virāma-pratjajābhjāsa-purvah samskāra-śeṣo 'njah / (18)

Notoj

\* La klasika ekzemplo estas, tiri el la kunigo de du vortoj, kiel monto kaj oro, kiuj signas realaĵojn, nur imagitan senrealaĵon : monto el oro !

\*\* En unu el la variantoj mankas "tamo" (de : "tamas-", malvigleco). La komentario de Vjaso pruvas ke en dormo tamen estas mensa aktiveco, eĉ se tre malvigla, atentigante ke oni memoras ĉu oni bone aŭ malbone dormis : "La revekiĝinto certe ne havus tiun ĉi memoron se ne estintus sento de sperto (...) Dormo estas do speco de sperto." (sa khalv ayam prabuddhasya pratyavamarso na syād asati pratyayānubhave (...) tasmāt pratyaya-viśeṣo nidrā). (Ĉar ni ne donas ties nagari-an originalon, male de la supraj tiu ĉi transskribo estas laŭ la norma internacia sistemo)

\*\*\* Tiu ĉi manifestiganta mondo tre verŝajne estas la intelekta. La parentezo estas aldono de la tradukanto el la komentario de Vjaso kiu glosas "guna-vaitr(i)ṣṇjam" per "vyaktāvyakta-dharmebhyo virakta".

\*\*\*\* La termino "puruṣa" estas tre malfacile tradukebla. Ĝi povas signifi : homo, viro, oficisto, servisto, animo, spirito, absoluto, animo de la universo (identigita kun Brahmo, Viŝnuo, Ŝivao, Kalio), kreanta principo (de la atomoj), primitiva (homa) individuo de kiu emanis la Makrokosmo...

## Unua libro (Anonima spirita sintezo de pluraj eŭroplingvaj tradukoj)

1. Jen instruo pri Jogo laŭ tradicia transdono.
2. Jogo celas la haltigon de la malordiganta funkciado de la menso.
3. Tiam malkovriĝas nia Estecon, fiksita en si mem.
4. Alikaze, ni konfuzas nian Estecon kun la diversaj mensaj movoj.
5. Ekzistas kvin modifoj de la menso, dolorigantaj aŭ ne.
6. Ili estas : la ĝusta rezonado, la erara penso, la imago, la dormo kaj la memorkapablo.
7. La ĝustaj rezonadoj baziĝas sur la klara percepto, la dedukto, la apogo de spiritaj skribaĵoj.
8. La erara penso konsistas el malvera kono, ĉar ĝi ne estas fondita sur la Estecon.
9. La imago havas nerealan bazon, ĉar ĝi apogiĝas sur parola kono.
10. La dormo okazas, kiam la menso forlasas ĉiujn objektojn pro malvigleco.
11. La memorkapablo konsistas el mensa restigado de konscia sperto.
12. La haltigon de la aŭtomataj mensaj movadoj oni akiras per intensa praktikado en sinteno je malligiteco.
13. Tiu praktikado konsistas en ĝusta klopodo fiksiĝi en si mem.
14. Necesas fervoro, daŭriga persistemo, sen interrompo dum longa tempo por firmigi ĝin.
15. La ne-alligiteco rezultas de tute konscia stato, kiu liberigas el la deziroj.
16. La plej alta grado en tenoĉeso kondukas al absoluta malligiteco pri la manifestiganta mondo, danke al plena konscio de la Estecon.
17. En la stato *Samādhi Samprajñāta* la konscio ankoraŭ direktiĝas eksteren kaj uzas pripensadon kaj rezonadon. Akompanas ĝin ĝojo kaj ekzistosento.
18. Kiam ĉesas ĉia mensa agemo, dank'al intensa praktikado, tiam aperas la sensubtena stato, *Samādhi Asamprajñāta*. Tamen daŭras la akumulitaj memoroj de la karmo.

## I - Samādhi-ĉapitro (Provo (de la redaktoro) de laŭvorta traduko rekte el sanskrito)

1. Jen metoda instruo pri jogo (laŭ tradicia transdono).
2. (La celo de) jogo estas haltigo de la turniĝoj de l'pensoj.
3. Tiam estas absorbiĝo de la observado en sia propra esenco.
4. (Lia) simileco al la pensoj estas kroma.
5. La pensoj estas kvinpecaj, turmentaj kaj neturmentaj :
6. Ĝusta kono, (kaj ties misa malo la) eraro, imago, dormo kaj memorado.
7. Percepto, indukto kaj tradiciaj scioj estas ĝustaj konoj.
8. Eraro estas miskono bazita sur ŝajna aspekto.
9. Devenanta el (nur) vorta kono, malplena je realeco estas imago.\*
10. Dormo estas penso/malvigleco kies bazo estas sperto de neekzisto.\*\*
11. (Mensa) neperdo de perceptita objekto estas memorado.
12. Ilia haltigo (de la pensoj) estas en trejniĝo kaj senpasiĉo.
13. Tie ĉi, strebado por stabileco estas la trejniĝo.
14. Tiu ĉi (strebado) senĉese praktikita dum longa tempo kun atento kaj zorgo firme staras.
15. Regata konscio de kiu deziras nek la vidatan mondon nek la (paradizon) promesitan de la tradicio (jen kio) estas senpasiĉo.
16. Ekstrema, tiu ĉi estas sendeziriĝo pri la kvalitoj (de la manifestiganta kaj nemanifestiganta\*\*\* mondoj), venanta de la perceptado de Dio.\*\*\*\*
17. Pro akompano de formoj de rezonado, ekzameno, beateco kaj memkonscio, estas absorbiĝo (*samādhi*) "kun distinganta konscio" (*samprajñāta*).
18. Post trejniĝo al la sperto de (ilia) ĉeso, restas nur antaŭaj mensaj dispozicioj (sed ne plu ia penso) en la alia (pli profunda absorbiĝo).

### Sanskrita komentario de Vjaso pri :

16. (Unuflanke,) kiu vidas la difektojn de la rigardataj kaj aŭdataj objektoj, tiu estas indiferenta. (Aliflanke,) kies spirito estas plenigita per la klara distingo de la pureco de Dio pro trejniĝo al Ties vidado, pri tiu oni diras ke li estas indiferenta antaŭ la kvalitoj kaj la karakteroj de la manifestigantaro kaj nemanifestigantaro.

Tiu duoblaĵo estas senpasiĉo. Kaj kio estas la lasta (el la du), tio estas nura heleco pro (spirita) kono, ĉe kies apero jogano, kies perceptado tiel levigis, pensas : "Atingita estas la atingebla ; detruitaj estas la detruendaj turmentoj ; tranĉita estas la paso de la ekzisto tra la kunigitaj juntoj, en kies neinterrompo, naskite oni mortas kaj mortinte oni (re)naskiĝas."

" De la kono la plej alta celo (estas)  
la senpasiĉo : de ĝi neekstera  
(estas) la senligiteco absoluta. "

18. La absorbiĝo sen distinga konscio estas haltigo de la penso ; la rimedo al ĝi estas ekstrema senpasiĉo. (...)  
"La penso perdas ĉian bazon, kvazaŭ atingante neniigon."

# "Jaro de la Toleremo", en Islamo ?

## Taslina Nasrin

Kiel Salman Rushdie\* la verkistino Taslima Nasrin estis mortkondamnita de islamista ĉefo en sia lando, Bangladeŝo. Malgraŭ generala striko en la tuta lando kontraŭ la islama integrisimo (la 30-7-94) kaj post apero antaŭ tribunalo pro akuzo pri "ofendo al la religioj sentoj de la islamanoj" (3-8-94). Kaŭcie liberigata, ŝi sukcesis fuĝi



dank'al norvega diplomato kaj rifuĝis en Svedio. Post unua kvazaŭa rifuzo de la registaro, Taslima Nasrin povis mallonge viziti Francion komence de decembro, kie ŝi akceptis renkonti tri integristajn junulinojn loĝantajn en la pariza regiono.

**Hakima** (21-jara edzino studanta ekonomikajn sciencojn) : (...) Mi ŝatus ke vi deklaru vin por aŭ kontraŭ la eksigo el la liceo, de la knabinoj (pro ilia rifuzo demeti sian islaman kaptukon).

**T. Nasrin** : Neniu islama virino konscia pri sia persono kaj siaj rajtoj devas, ĉiukaze, surmeti la kaptukon, ĉar tio ĉi estas konsenti pri malsupereco. Kiam ni havis laikan ŝtaton en Bangladeŝo, la virinoj estis la unuaj por postuli de la aŭtoritatoj ke ili voĉdonu leĝon malpermesanta la kaptukon, kaj tio ĉi por la bono de la virinoj.

**Hakima** : Gravege strangas tamen, ke vi volas nian feliĉon malgraŭ ni ! Voli altrudi viajn ideojn al la aliaj, starigi leĝon malpermesantan la kaptukon, jen integrisimo ! Laŭ vi mi estas obskurantista. Vi, vi montras grandegan maltoleremon.

**T. Nasrin** : Mi estas perfekte maltolera al sistemo diskriminacia kontraŭ la virinoj, ĉar ĝi estas perfekte maltolera. (...)

**Rahima** : (16-jara liceanino kiu, post apero antaŭ "disciplinkonsilio", akceptis anstataŭigi ene de la lernejo sian kaptukon per capo, pro sia volo daŭrigi la studojn) : Mi ne legis vian libron, mi ne ŝatas viajn kritikojn, sed mi kondamnas la homojn kiuj kondamnas vin al morto.

**Fatima** : (20-jara studentino pri la angla, ankaŭ kun vualo sur la kapo) : Ankaŭ mi, mi ne aprobas.

**Hakima** : Senkulpigu min. Kiu eldiris la *fatua*-n (religian juĝon) ?

**T. Nasrin** : Religia ĉefo. Ne estas iu pli islamista ol li !

**Hakima** : Mi ne volas deklari min por aŭ kontraŭ io kion mi ne konas...

**Fatima** : En mia urbo junulino, Safia, oficiale deklaris sin por la mortverdikto eldirita kontraŭ vi. Sed temas pri knabineto, kaj oni ne petas ŝian opinion pri tia temo, de 13-jara knabino.

**T. Nasrin** : Ŝi estas blindulino ! (...)

Intervjuitaj de E. Schemla\*\*

\* Vidu *Asistilon* n-ro 11 p.7.

\*\* El *Le nouvel observateur*, n-ro 1570, 8-14 dec. 1994.

## Alvoko por Sudano

"La islama-araba penetrado en Sudanon estas konkero, kiu celas la integran asimiladon per teroro kaj malsatego. La nigra raso kaj afrika kulturo estas minacataj." (M-ro Taban, sudana episk.)

## "Homrajtoj en Islamo"\*

1. Sekureco de vivo kaj proprieto : (...) La Profeto diris "Kiu mortigas homon (eĉ ne-islamano) ne sentos la parfumon de la Paradizo."

6. Libereco de esprimo : Islamo donas la rajton je libereco de penso kaj esprimo al ĉiuj civitanoj de la islama ŝtato kondiĉe ke ĝi estu uzata por la disvolvo de virto kaj vero kaj ne por disvastigado de malbono kaj malico. (...) Neniel Islamo permesus al malbono kaj malico esti disvolvata. Ĝi ankaŭ ne donas al iu la rajton uzi insultan aŭ ofendan lingvaĵon nome de kritiko. Estis la kutimo de la Islamanoj demandi la Sanktan Profeton ĉu pri iu temo dia ordono estis revelaciita al li. Se li diris ke li ricevis neniun dian ordonon, la Islamanoj libere esprimis sian opinion pri la temo.

8. Libereco de konscienco kaj konvinko : Islamo promulgis jenan ordonon : "Devas esti neniun trudado rilate la kredon." (...)

9. Protekto de Religiaj Sentoj : Kune kun libereco de konvinko kaj libereco de konscienco Islamo donis la rajton al la individuo ke liaj religiaj sentoj ricevu la meritan respekton kaj ke nenio estos dirata aŭ farata kiu povas tuŝi lian rajton.

\* Flugfolio eldonita de la *Monda Asembleo de la Islama Junularo* (WAMY, P.O.Box 10845, Riyad 11443, Saudi-Arabio), ricevita en Riva (I) dum la WCRP-renkontigo.

## Ĉeĉenio : ne religia milito

La granda muftio de Grozni kaj la ortodoksa patriarko de Moskvo Aleksij la II-a, kunigis siajn voĉojn jam meze de decembro 94, por kondamni ĉian religian interpreton de la tiea arma konflikto kaj provi ekigi procezon de traktado kaj paco.

"Islamismo estas religio kiu starigas elementajn regulojn de komuna vivo. Tio estas esenca fundamento por purigi la animon kaj la spiriton kaj eviti fari malhonestajn agojn", klarigas Ahmed Timirsultanov, direktoro de la 350-studenta kora-lernejo (*medersa*) de Baci-Iurt en Ĉeĉenio. Ĝia praktiko tamen dependas de individua volo kaj ne povas esti altrudata. "Ne la ekstera aspekto gravas. Tro facile estas ŝajnigi. Oni devas esti ligita al Dio per sia animo, per sia koro." Li diras sian plezuron renkonti vizitantojn de malsama kulturo. "Ni ĉiuj havas la saman Dion", ridetas tiu homo modestaspekta, kiu estis kaŝa disĉiplo de mulao de 1966 gis 1972.

Fronte al la minacoj de religia milito<sup>3</sup>, al la defioj de la moderneco (...) la kristan-islama dialogo ne plu povas esti nur elektable temo.

1/ Henri Tincq, *Le Monde*, 3-3-1995, p.1 kaj 15.

2/ Intervjuita de J.-Chr. Ploquin (*La Croix*, 25-2-95).

3/ En la Rusia Federacio vivas preskaŭ 20 % da islamanoj.



# 500-a naskiĝ-datreveno de Frato Francisko Rabelezo

Kvankam laŭ XVIII-jarcenta surskribo en la Pariza preĝejo Sankta Paŭlo François Rabelais naskiĝis en 1483 (naskiĝjaro de Marteno Lutero), 1494 estas nun komune prikonsentita kiel plej probabla dato de lia naskiĝo apud Chinon (F). Tial ĝi estis celebrata lastan jaron en Francio.

Oni konas lin ĉefe kiel aŭtoro de komikaj romanoj (*Gargantuo, Pantagruel, kaj la sekvaj*), kelkfoje ankaŭ kiel humanisto aŭ kuracisto; kaj por esperantistoj li estas ĉefe unu el la unuaj<sup>1</sup> kiuj ekkonsciis: "Eraro estas diri ke ni havas naturan lingvon: la lingvoj estas per arbitraj fondadoj kaj konvencioj de la popoloj; la vortoj, kiel diras la dialektikistoj, ne signifas nature sed laŭplace."<sup>2</sup> Sed iam en sia vivo li ankaŭ estis franciskana religiulo kaj poste benediktana monaĥo. Kaj fine, por la fama XIX-jarcenta aŭtoro Balzac li estas "la plej granda spirito de la moderna homaro, kiu resumas Pitagoron, Hipokraton, Aristofanon kaj Danton".

Li verŝajne komencis siajn studojn, knabo, ĉe la abatejo Seuilly<sup>3</sup>, eble estis novico, 16-jara, ĉe la konvento La Baumette<sup>4</sup>, fariĝis franciskano en Fontenay-le-Comte<sup>5</sup> en 1520 (kvankam iu<sup>6</sup> skribis ke li eniris ĝin apenaŭ 10-jara!).

Samjare li konatiĝas kun la humanisto Vilhelmo Budé. Fine de 1523 liaj superuloj konfiskas liajn grekajn librojn pro la komentarioj pri la greka teksto de la Evangelioj, verkitaj de Erasmo (kiun li rigardis kiel sian spiritan patr(in)on<sup>7</sup>); sed ili estas baldaŭ redonataj. Tamen en 1524 li petas la papon permesi al li forlasi la franciskan ordenon, oficiale pro ties troa aŭstereco, kaj estas akceptata ĉe la benediktana abatejo Maillezais<sup>8</sup>. Iam li estis ordinata sacerdoto car ĉ. 1528 li forlasas la benediktanojn por fariĝi sekulara pastro.

Li restadas en Parizo de 1528 ĝis 1530, kie li eble komencas siajn medicinajn studojn: li registriĝas la 17-an de septembro 1530 ĉe la medicina fakultato en Montpellier (monpelje), estas akceptata kiel bakalaŭro la 1-an de novembro, kaj jam la sekvan jaron gvidas dumonatan kurson komentariante la maksimumojn de Hipokrato kaj la *Arto de Galien*. En 1532 li estas en Liono kaj publikigas latinan tradukon de la greka teksto de la Hipokrataj maksimumoj, kaj estas nomumata medicinisto de la "Di-hospitalo". Tiam li publikigas *Pantagruel*, verkitan en tri monatoj! Ĝi estas kondamnata de la Sorbono, kiel obscena libro.

## La Abatejo de Telemo

Printempe li restadas en Romo kun la kardinalo Johano du Bellay (dŭbele), kiu fariĝas lia alta protektanto: li plurfoje restados en lia kastelo Glatigny (glatinji)<sup>10</sup>, kiu laŭdire estis konstruata laŭ la planoj mem de Rabelezo, kun la imagita Telema abatejo kiel modelo. Denove en Romo en 1535-36 li studas arkeologion kaj la araban.

Intertempe li publikigis *Gargantuo*<sup>11</sup>, ankaŭ kondamnitan. El tiu ĉi libro ni tradukas<sup>12</sup> ĉi-sube lian priskribon de bela utopio inspirita tra Erasmo de sankta Hieronimo (IV-an jc.) kiu parolis pri: "kristana kaj monaĥa epikurismo (...) Al la studado, al la fastoj, al la psalmorecitado, al la maldormadoj, ĉiu sentis sin spontanee instigata aŭ estis invitata per la ekzemplo; li ne estis truddevigata per homaj reglamentoj (...) Fine, se iu ekbedaŭris sian vivelekton, li ne riskis alian punon ol esti taksata je malkonstanteco."

Li fariĝas patro (en 1536?) de infano mortonta dujara, verŝajne post la papa absolvo pri lia forlaso de la religiula vivo. Post papa permeso ke li refariĝu benediktano, li estas akceptata de eksa benediktana monaĥejo<sup>13</sup> jus fariĝinta kanonikaro. Kiel la aliaj li do fakte fariĝas "regula kanoniko", kio permesas al li laŭleĝe havi posedaĵojn.

La sekvan jaron en Montpellier li ricevas la titolon de doktoro pri medicino. Li estas en la sekvantaro de la reĝo Francisko I-a kiam li reamikiĝas kun la reĝo Karolo la Kvina. En 1540 li sukcesas leĝigi al la papo siajn du pliajn bastardojn.

Post tri jaroj *Gargantuo* kaj *Pantagruel* estas cenzurataj de la franca Parlamento pro peto de la teologoj. Kaj lia tria libro, publiĝita post tri jaroj, estas kondamnata de la teologoj car laŭ ili "plena de herezoj", kaj li do rifuĝas en Metz kie li estas nomumata ĉefkuracisto de la urbo.

Li finas sian vivon kiel parohestro, mortante en Parizo en aprilo 1553, post cenzuro de lia *Kvara Libro* fare de la Sorbonaj teologoj. Lia *Kvina Libro* ekaperos naŭ jarojn post lia morto.<sup>14</sup>

1/ Eble la unua franco diskoniginte tion ĉi car 3 jarojn antaŭ J. Bellay, kiu skribis en sia *Deffense et illustration de la langue françoise*: "La Lingvoj ne naskiĝis per si mem kiel herboj, radikoj kaj arboj (...) sed illa tuta forto naskiĝis en la mondo el la volo kaj arbitro de la mortemuloj." (1549)

2/ "C'est abus, dire que ayons languaige naturel: les languaiges sont par institutions arbitraires et convenences des peuples; les voix, comme disent les dialecticiens, ne signifient naturellement, mais à plaisir." El la *Tria Libro*, publikigita en 1546, kaj kondamnata de la teologoj. Parte citita kaj adaptita de C. Piron, *Le défi des langues*, 1994, p.225.

3/ Prononciĝas *sŭji*; 10 km for de Chinon.

4/ Prononcu *labomet*; apud Angero en la provinco Anĝuo.

5/ En la apuda provinco Puatuo.

6/ G. Colletet, XVII-jarcenta aŭtoro.

7/ Ankaŭ jaron de la papa ekskomuniko de Lutero.

8/ "Patro, mi diris, mi diros eĉ patrino, se via "indulgeco" permesas tion ĉi al mi (...) La lometon kiu mi estas kaj ĉiom krom mi povas valori, mi ricevis de vi sola."

9/ Prononciĝas *majze*; ankaŭ en Puatuo.

10/ Proksime de kiu loĝas du simpatiantoj de Asisti!

11/ Tiu ĉi estas la patro de *Pantagruel*, heroo de la 1-a libro.

12/ "Ŝajne traduko kompleta de *Gargantua kaj Pantagruel* kuŝas ĉe heredantoj de E. Motillon?" Eble pro la 500-jariĝo estus nun oportune serĉi la manuskripton kaj eldoni ĝin?

13/ La abato estis lia amiko du Bellay, episkopo de Parizo.

14/ Notinde estas ke unu el la plaj famaj verkistoj el la mondo, Goeto, verkis post tri jarcentoj sekvaĵon de lia *Pantagruel* (*La vojaĝo de Megaprozon*, 1837).

## Comment Gargantua feist batir pour le moyne l'abbaye de Thélème<sup>1</sup>.

Restoit seulement le moyne à pourvoir, lequel Gargantua vouloit faire abbé de Seuillé, mais il le refusa (...) Le moyne luy fist responce péremptoire que de moyne il ne vouloit charge ny gouvernement :

*"Car comment (disoit-il) pourroy-je gouverner aultruy, qui moy-mesmes gouverner ne sçaurois ? Si vous semble que je vous aye faict et que puisse à l'advenir faire service agréable, outroyez-moy de fonder une abbaye à mon devis."*

La demande pleut à Gargantua, et offrit tout son pays de Thélème, jousté la rivière de Loyre, à deux lieues de la grande forest du Port Huault, et requist à Gargantua qu'il instituast sa religion au contraire de toutes aultres.

*"Premièrement doncques (dist Gargantua) il n'y faudra jà bastir murailles au circuit, car toutes aultres abbayes sont fièrement murées.*

*- Voyre (dist le moyne), et non sans cause : où mur y a et davant et derrière, y a force murmur, envie et conspiration mutue."*

(...) Et parce que ès religions de ce monde, tout est compassé, limité et reiglé par heures, feut décrété que là ne seroit horologe ny quadrant aucun, mais selon les occasions et oportunités seroient toutes les oeuvres dispensées ; car (disoit Gargantua) la plus vraye perte du temps qu'il sceust estoit de compter les heures - quel bien en vient-il ? - et la plus grande resverie du monde estoit soy gouverner au son d'une cloche, et non au dicté de bon sens et entendement.

(...) Item, parce que ès conventz des femmes ne entroient les hommes sinon à l'emblée et clandestinement, feut décrété que jà ne seroient là les femmes au cas que n'y feussent les hommes, ny les hommes au cas que n'y feussent les femmes.

Item, parce que tant hommes que femmes, une foyz repceuz en religion, après l'an de probation, estoient forcez et astrictz y demeurer perpétuellement leur vie durant, feust estably que tant hommes que femmes là repceuz sortiroient quand bon leurs sembleroit, franchement et entièrement.

Item, parce que ordinairement les religieux faisoient troys veuz, sçavoir est de chasteté, pauvreté et obédience, fut constitué que là honorablement on peult estre marié, que chascun feut riche et vesquist en liberté (...)

## Comment feust bastie et dotée l'abbaye des Thélémites

Pour le bastiment et assortiment de l'abbaye Gargantua feist livrer de content vingt et sept cens mille huyt cens trente et un moutons à la grand laine<sup>2</sup>, et par chascun an, jusques à ce que le tout feust parfaict, assigna (...) seze cens soixante et neuf mille escuz au soleil<sup>2</sup>, et autant à l'estoille poussinière<sup>2</sup> (...)

Le bastiment feut en figures exagone, en telle façon que à chascun angle estoit bastie une grosse tour ronde à la capacité de soixante pas en diamètre, et estoient toutes pareilles en grosseur et portraict.

La rivière de Loyre découloit sus l'aspect de septentrion. Au pied d'icelle estoit une des tours assise, nommée Artice, et, tirant vers l'Orient, estoit une nommée Calaer ; l'autre ensuivant, Anataole ; l'autre après, Mesembrine ; l'autre après, Hesperie ; la dernière, Cryere. Entre chascune tour estoit espace de

## Kiel Gargantuo konstruigis por la monaĥo la abatejon de Telemo<sup>1</sup>.

Ankoraŭ provizendis nur la monaĥo, kiun Gargantuo volis fari abato de Seuillé (sōje), sed li rifuzis tion ĉi (...) La monaĥo faris al li nediskuteblan respondon, ke pri monaĥoj li ne volis zorgadani ŝarĝon nek regadon : *"Ĉar kiel, li diris, povos regi super aliiu mi kiu min mem regi ne sciis ? Se al vi ŝajnas ke mi faris al vi kaj ke mi povos estonte fari agrablan servon, permesu al mi fondi abatejon laŭ mia ideo"*.

La peto plaĉis al Gargantuo, kaj li donacis sian tutan landon Thélème (telem), bordantan la riveron Luaro, du leŭgojn for de la granda arbaro Port Huault (por ŭo) ; kaj li petis de Gargantuo, ke li establu sian religiregularon male de ĉiuj aliaj.

*"Unue do, Gargantuo diris, oni devos ja ne konstrui muregojn ĉirkaŭe, ĉar ĉiuj aliaj abatejoj estas imponigeme murĉirkaŭitaj.*

*- Vere, la monaĥo diris, kaj ne sen kaŭzo : kie muro estas kaj antaŭe kaj malantaŭe, estas multe da murmuro, reciproka envio kaj konspiro."*

(...) Kaj ĉar en la ĉi-mondaj religiregularoj, ĉio estas fiksita, limigita kaj reguligita de horaro, estis dekretite ke tie estu neniu murhorloĝo nek sunhorloĝo, sed laŭ la okazoj kaj oportunaĵoj estos ĉiuj laboroj disdonataj ; ĉar, Gargantuo diris, la plej vera perdo de tempo kiun li konas estas komputi la horojn - kia bono venas de tio ĉi ? - kaj la plej granda miso en la mondo estas sin regi laŭ la sono de sonorilo kaj ne laŭ la dikto de la komuna saĝo kaj inteligento.

Krome, ĉar en la virinaj konventoj ne eniris la viroj krom enŝteligante kaj kaŝe, estis dekretite ke tie ja ne estos la virinoj se la viroj ne estos, nek estos la viroj se la virinoj tie ne estos.

Krome, ĉar viroj same kiel virinoj, ricevitaj en religia vivo post la jaro da provado, estas devigitaj kaj pritrudataj tie restadi senĉese dum sia tuta vivdaŭro, estis decidite ke viroj same kiel virinoj tie ricevitaj eliros kiam tio ŝajnos al ili bona, libere kaj senrezerve.

Krome, ĉar kutime la religiuloj faris tri votojn, t.e. pri ĉasteco, malriĉeco kaj obeado, estis enkonstituciigite ke tie honorinde oni povas esti edziĝinta, ke ĉiu estu riĉa kaj vivu en libereco (...)

## Kiel estis konstruata kaj provizata la abatejo de la Telemanoj

Por la konstruado kaj la pretigado de la abatejo, Gargantuo liverigis kontante dudeksep centmil okcent tridek unu longlanajn ŝafojn<sup>2</sup>, kaj por ĉiu jaro ĝis ĉio estos finfarita, li asignis sescent sesdek naŭmil sun-eskudojn kaj sammultajn stelojn<sup>2</sup>.

La konstruaĵo estis desegnita sur la planoj heksagona, tiel ke ĉe ĉiu angulo estis konstruita dika ronda turo havanta sesdek paŝojn en la diametro, kaj ili estis ĉiuj similaj pri dikeco kaj strukturo.

La rivero Luaro fluis ce la nordo. Borde de ĝi situis unu el la turoj, nomita Arkta, kaj pli oriente

# de la Deziro

troys cens douze pas. Le tout basty à six estages, comprenant les caves soubz terre pour un (...)

Depuis la tour Artice jusques à Cryere estoient les belles grandes librairies, en Grec, Latin, Hébreu, François, Tuscan et Hespaignol, disparties par les divers estaiges selon langaiges (...)

Depuis la tour Anatole jusques à Mesembrine estoient belles grandes galleries, toutes pinctes des antiques prouesses, histoires et descriptions de la terre. Au milieu estoit une pareille montée et porte comme avons dict du cousté de la rivière. Sus icelle porte estoit escript, en grosses lettres antiques, ce que s'ensuit:

*"Cy n'entrez pas, hypocrites, bigotz (...)  
Cy entrez, vous, et bien soyez venuz  
Et parvenuz, tous nobles chevaliers !"*

## Comment estoient reiglez les thélémites à leur manière de vivre.

Toute leur vie estoit employée non par loix, statuz ou reigles, mais selon leur vouloir et franc arbitre. Se levoient du lict quand bon leur sembloit, beuvoient, mangeoient, travailloient, dormoient quand le désir leur venoit ; nul ne les esveilleoit, nul ne les parforceoit ny à boyre, ny à manger, ny à faire chose aultre quelconques. Ainsi l'avoit estably Gargantua. En leur reigle n'estoit que ceste clause :

### FAY CE QUE VOULDRAS.

parce que gens libères, bien nez, bien instruitz, conversans en compaignies honnestes, ont par nature un instinct et aiguillon, qui tousjours les pousse à faictz vertueux et retire de vice, lequel ilz nommoient honneur. Iceux, quand par vile subjection et contraincte sont déprimez et asserviz, détournent la noble affection, par laquelle à vertuz franchement tendoient, à déposer et enfreindre ce joug de servitude : car nous entreprenons tousjours choses défendues et convoitons ce que nous est dénié.

Par ceste liberté entrèrent en louable émulation de faire tous ce que à un seul voyoient plaie. Si quelq'un ou quelcune disoit : *"Beuvons"*, tous buvoient ; si disoit : *"Jouons"*, tous jouoient ; si disoit : *"Allons à l'esbat ès champs"*, tous y alloient (...)

Tant noblement estoient apprins qu'il n'estoit entre eux celluy ne celle qui ne sceust lire, escrire, chanter, jouer d'instrumens harmonieux, parler de cinq et six langaiges, et en iceux composer tant en carme que en oraison solue. Jamais ne feurent veuz chevaliers tant preux, tant gualans, tant dextres à pied et à cheval, plus vers, mieulx remuans (...) Jamais ne feurent veues dames tant propres, tant mignonnes, moins fascheuses (...)

Par ceste raison, quand le temps venu estoit que aucun d'icelle abbaye (...) voulust issir hors, avecques soy il emmenoit une des dames, celle laquelle l'auroit prins pour son dévot, et estoient ensemble mariez, et, si bien avoient vescu à Thélème en dévotion et amitié, encore mieulx la continuoient-ilz en mariaige ; d'autant se entreaymoient-ilz à la fin de leurs jours comme le premier de leurs nopces.

1/ La vorto greke signifas "deziro".

2/ Nomoj de moneroj. La unuaj, oraj, estis stampitaj per bildo de *Agnus Dei* ("Safido de Dio"); la duaj, de Ludoviko la XI-a, per suno ; la triaj, imagitaj de Rabelezo, per la sep steloj de la Plejado, tiam ankaŭ nomita *Poussinière*.

3/ Kp kun sankta Aŭgusteno: *"Anu kaj faru kion ci volas"*.

estis alia, nomita Belaera ; la sekva, Orienta ; la alia poste Antarkta ; la alia poste Vespera ; la lasta Glacia. Inter ĉiu turo estis spaco 312-paŝa. La tuta estis konstruita kun ses etaĝoj enkalkulante la kelojn sub tero kiel unu (...)

De la turo Arkta ĝis la turo Glacia estis la belaj grandaj librejoj en la greka, la latina, la hebrea, la franca, la germana kaj la hispana, dispartitaj sur la diversaj etaĝoj laŭ la lingvoj.

(...) De la turo Orienta ĝis la turo Antarkta estis belaj grandaj galerioj, tute pentritaj per antikvaj herosoj, historioj kaj priskriboj de la tero. Meze estis suprenirejo kaj pordego tiaj kiaj ni priskribis ilin ĉe la rivera flanko. Sur tiu ĉi pordo estis skribita, per grandaj antikvaj literoj, la jenon :

*"Ĉi tien ne eniru, hipokrituloj, bigotoj (...)  
Ĉi tien eniru vi, kaj bone estu venitaj  
kaj alvenitaj, ĉiuj noblaj kavaliroj (...)"*

## Kiel estis reguligitaj la Telemanoj ĉe sia vivmaniero

Ilia tuta vivo estis uzata ne laŭ leĝoj, statutoj aŭ reguloj, sed laŭ ilia volo kaj libera arbitro. Ili ellitigis kiam bone ŝajnis al ili, trinkis, manĝis, laboris, endormigis kiam la deziro venis al ili ; neniu vekis ilin, neniu perforte igis ilin nek trinki nek manĝi nek fari ion alian, ian ajn. Tiel estis decidinta Gargantua. En ilia regularo estis nur tiu ĉi klaŭzo : FARU KION CI VOLOS<sup>3</sup>,

ĉar homoj liberaj, bone naskitaj, bone instruitaj, kunvivantaj en honestaj kompanioj, nature havas instinkton kaj pikilon, kiu ili nomas honoro, kiu ciam impulsas ilin al virtaj faroj kaj ilin detenas de malvirto. Kiam per sia submeto kaj trudo ili estas deprimitaj kaj sklavigitaj, ili deturnas la noblan emon, per kiu virton libere ili celis, al forigo kaj malobservo de tiu sklaviga jugo : ĉar ni ĉiam ekfaras malpermesitajn kaj deziregas tion kio estas rifuzita.

Pro tiu ĉi libereco mem la Telemanoj laŭdinde ekkonkuris por ĉiuj fari kion ili vidis plaĉi al unu. Se iu aŭ iinu diris : *"Ni trinku"*, ĉiuj trinkis ; se diris *"Ni ludu"*, ĉiuj ludis ; se diris *"Iru ni petoli en la kampoj"*, ĉiuj iris tien (...)

Tiom noble ili estis edukitaj ke ne estis inter ili iu nek iinu kiu ne scipovus legi, skribi, kanti, ludi harmoniajn instrumentojn, paroli kvin kaj ses lingvojn, kaj en ili verki same verse kiel proze. Neniam oni vidis kavalirojn tiom prodaj, tiom noblaj, tiom lertaj piede kaj surĉevale, pli vivplenaj, plibone viglaj (...) Neniam oni vidis damojn tiom elegantaj, tiom ĉarmaj, malpli malagrablaj (...)

Pro tio, kiam venis la tempo ke iu de tiu ĉi abatejo (...) volis eliri, kun si li kunprenis unu el la damoj, tiun kiu elektis lin kiel sian devotulon, kaj ili kune geedzigis kaj, tiel bone ili estis vivintaj ĉe Telemo en sindonemo kaj amikeco, ke ankoraŭ pli bone ili daŭrigis ĝin en la geedzeco. Ili sin interamis en siaj lastaj tagoj tiom kiom en la unua de sia nupto.

# Prepare al la venonta I.S.E.

( *Interreligia seminario esperantista* )

Pavla Dvořáková klopodas estigi la (duan) seminarian broŝuron. Ŝi bezonas precipe :

1. Lingvistika temo : laŭeble konciza (vortareca) klarigo pri kompreno de bazaj nocioj, en : hinduismo, taoismo, judismo, kristanismo, bahaismo, budhismo, zeno, ŝintoismo...

Proponataj temoj: a/ Dio (Plej-Alto, Absoluto) ; b/ Homo (lia esenco, korpo-animo-spirito, rilato al Dio, lia destino) ; c/ Senco de la vivo, Savo, Vojo al Savo (ankaŭ nocioj tiaj : peko, pento, pefektigo, pardono, juĝo, ĉielo, paradizo, infero, ktp.) ; d/ Kredo (Religio).

2. Etlko en teorio kaj praktiko : koncepto pri Amo kiel elirpunkto, principoj de rilato al la aliaj (precipe en formo de pripensoj, paraboloj, rakontetoj), personaj rakontetoj kaj spertoj.

3. Ŝatataj kaj de vi uzataj preĝoj kaj meditoj.

Bonvolu tuj sendi al ŝia adreso : Dvořáková, Ostravska 637, CZ-19900 Praha 9 (Letnany), Ĉeĥio. (Teoria limdato : 1-an de aprilo 1995 !)

Jen, ekz-c, kontribuaĵo per kelkaj PIV-aj difinoj kaj klarigoj/opinioj el interreligia vortaro\*.

## Spirito

PIV 7/ (se paroli pri religioj nekristanaj) : Superhoma senkorpa esto ;

8/ (se paroli pri Biblio) : Dia aŭ diabla inspiro aŭ forto.

I.V. Spirito (kun majuskla S) kutime temas pri Dio. Kristanoj parolas pri la Sankta Spirito kiel unu el la personaj manifestigoj de Dio tra historio kaj en la vivo de la Eklezio. Judoj kaj islamanoj ankaŭ parolas pri la Spirito de Dio. Tial la vorto aparte utilas dum interreligia kunlaborado ĉar temas pri Dio kiun la kristanoj nomas Patro, la judoj YHWH, kaj la islamanoj Allah (t.e. "la unusola Dio"). Plie, anoj de aliaj religiaj tradicioj, inkluzive de la indiĝenaj tradicioj, ankaŭ nomas la dian/plejan potencon Spirito.

Krome Spiriton eblas imagi aŭ ina aŭ malina aŭ neknek, kaj tio ebligas al religiuloj kiuj malsame sentas pri la "homecaj" priskriboj pri Dio, kaj interkonsenti kaj malkonsenti. Eblas konsenti pri Dio kiel Spirito, eĉ se oni malkonsentas pri Dio kiel Patro, YHWH, Allah, la Granda Spirito aŭ Diino. Dum interreligia diskutado la pluralo Spiritoj estas neniam uzata, sed oftas la pluralo spiritoj. Ĉi-lasto temas pri spiritaj estaĵoj aŭ energioj, kiujn ankaŭ eblas konsideri venantaj el unu Spirito.

## Religio

PIV Tuto de la procedoj per kiuj homoj kredas povi interrilati kun supernaturaj estaĵoj kaj efiki sur ilin aŭ certigi al si postmortan definitivan feliĉon (savigon).

I.V. Ritoj/faroj kaj kredoj de homoj religiaj.

## Religia

I.V. Temas pri la sinteno aŭ karaktero de homo kiu estas pia (pia = (PIV) sincere kaj ame respektoplena al Dio kaj religiaj aferoj) aŭ kiu dediĉas sin al la spirita disciplino de sia fido-komunumo. La latina vorto religio signifas "esti ligita", sekve esti religia estas spirite ligiĝi al Dio. Ĉi-ligoj estas la disciplino kiun membroj de iu tradicio akceptas kiel sia praktiko. Sekve persono religia estas iu kiu praktikas laŭ sia fido ene de fidokomunumo kaj ties tradicio.

## Fido

PIV = kredo 2 (t.e.) : mensa konsento pri religiaj aŭ filozofiaj opinioj kiujn oni rigardas veraj, kvankam nedemonstreblaj.

I.V. Temas pri fidi en Dio, kaj/aŭ en la instruoj kaj instruistoj de iu tradicio, kio necesas por savigo. Fido ne estas kredo kvankam ĝin ĉiam akompanas kredoj. Kredoj estas konceptoj. Fido estas fidanta rilato, kun Dio kaj/aŭ kun siaj instruistoj, konataj per skribaĵoj kaj persona travivaĵo. Fido estas pli ol nura mensa aktivado, ĝi rilatas al la tuta personeco.

Fido estas fidi kaj dependi de tio kio ne estas ĉiam klara aŭ konvinka al la menso. Por havi fidon, necesas kredi almenaŭ je la ebleco de savigo, sed ne necesas kredi ion specifan pri tio kio necesas por savigo.

## Devota

PIV Devota : sindoneme, fervore pia.

Devotaĵoj : 1/ Objektoj kiuj inklinas al pia fervoreco (rozario, kultaj bildoj ktp)

2/ Tuto de la preĝoj kaj adoragoj.

I.V. Devotado : 1/ Adorado, meditado kaj preĝado. Dum interreligiaj kunvenoj ĉi-termino estas (angle!) uzata por priskribi religian praktikadon kiun la partoprenantoj povas komune fari.

Devota : 2/ Sinteno de fido kaj submetiĝo al la dia / la plejalta.

## Peko

PIV Malobservo de religia aŭ morala leĝo.

I.V. Tio kio apartigas nin de Dio (ci-koncepto disvolviĝis ene de la juda kaj kristana tradicioj). (...) Peko estas la malbono kiun ni faras eĉ kiam ni celas bonon. Ni ofte iluzias nin pri ni mem vidante la malbonon kiun faras la aliaj sed ne la propran.

( Al mi - Majk - plaĉas la iam legita difino "peko : nodo en la koro". Krome plaĉas la duo : Dio / deo , por diferencigi ekzemple inter la kristana Dio kaj la hindaj dioj : tiuj ĉi estu *deoj* ! )

Mike Sadler

\*I.V.: "An Interfaith Dictionary", de Robert Traer, Oxford : IARF, 1993, 42 p.

# Tibeto

## La Potala ĉine restaŭrita

Ekde 1994 la Potala estas registrita en la Uneska listo de la *monda heredaĵo de la homaro*. Post 5-jara ĉin(ig)a restaŭrado ĝi estis inaugurata sen invito al ia reprezento de ĝia legitima posedanto, la Dalai-Lamao. Ĉi-okaze tri monaĥoj manifestaciis kriante *"Tibeto estas sendependa"*. Ili estis rapide arestataj. (LT n-roj 23, sept.94, kaj 25, jan.1995).

## Monaĥejoj ĉirkaŭitaj de la armeo

Komence de januaro en la monaĥejo Yamure kaj apudaj vilagoj, afiŝoj petis la ĉinojn rehejmeniri, proklamante: *"Tibeto apartenas al la Tibetanoj"*. La 8-an, dekunu policaŭtoj kaj tri kamionoj (cento da soldatoj) subite entrudis sin en la monaĥejon kaj arestis 20-jaran monaĥon, Chöde, ĉar la skribo de la tekstoj ŝajnis lia. La 11-an, du aliaj monaĥoj, Sönam Tsering kaj Norbu, estis same arestataj, de ĉ. 120 soldatoj kvankam la monaĥejo enhavas nur "plenmanon" da enloĝantoj.

Jam okazis similaĵoj en 1993 (vd. n-ron 14 p.20); kaj dum la somero 1994: kvin monaĥinoj de la monaĥinejo Shar Bumpa estis manifestaciintaj en Lhasao kaj tuj arestitaj. Post tri tagoj la monaĥinejo kaj la apudaj kvartaloj, kie loĝas monaĥoj, estis invaditaj. Iuj monaĥinoj batalis kontraŭ la polico kaj difektis veturilon. *"Ekde tiam la monaĥinejo kaj la monaĥejo estas ĉirkaŭitaj de la militistoj"*. Ĉiu el la gemonaĥoj estis pridemandataj, kaj okazis arestadoj. *"Lau la homoj kiuj alvenas de tiu ĉi vilago, la monaĥinejo estas ĉirkaŭita tiel ke la gemonaĥoj estas tute malebligataj moviĝi eksteren"*. (Lau *Lettre du Tibet*, n-ro 23 kaj 26, feb.1995)

## La Dalai-Lamao en Eŭropo

Post vizito al Anglio kie li devis renkonti budhistajn kaj kristanajn reprezentantojn ĉe la londona universitato kaj inaŭguri Domon de Tibeto, la Dalai-Lamao alvenis en Francion (19-11-94).

*"Marseille Espérance"* (kunigo de Marsejlaj religiaj kaj spiritaĵoj komunumoj) organizis en la Pharo-palaco kunvenon honore al la Dalai-Lamao kiu, ĉirkaŭita de reprezentantoj de ciuj kristanaj, islamaj, judaj kaj budhistaj komunumoj, firme pledis favore al interreligia dialogo, promesante ke li fariĝos mem propagandisto de la ideoj de Marsejlo Espero, kaj deziresprimante ke fondiĝu similaj asocioj en aliaj urboj francaj kaj alilandaj.

Sekvis prelego antaŭ pli ol 2.000 Marsejlanoj. Jen lia fina respondo, al ies demando *"Kiujn konsilojn doni al la okcidentaj budhistoj?"*

*"Fariĝu bonaj homoj!"*

En Barcelono preskaŭ 3.000 budhistoj venis el tuta Eŭropo ĉeesti liajn instruojn (10/18-12-94) kaj ricevi la inicadon al Kala-ĉakra. 15.000 Barcelonanoj venis aŭskulti lian prelegon pri Paco.

*Lastminute*: Malperfortan internacian marŝadon Delhi-Lhasaon anstataŭas Dharamsala-Delhio. Ĝi devis foriri post plurcentthoma fasto (la 10-3-1995).

Ni aŭskultis por vi:

## "Kantoj de espero kaj de libereco"

(Jen do traduko de kelkaj eltiraĵoj el la kantoj de la monaĥinoj malliberigitaj en Drapĉhi\* :)

1. Kie estas mia lamao, mia spirita radiko?  
La ĉinoj forpelis lin.  
Ni preĝas ĉiujn budhojn el la 10 direktoj:  
Gardu nin kaj Tibeton:  
Neĝlando, Neĝlando, mia amata lando!  
La ma(j)stro de la reĝlando estas li,  
Tenzin Gjatso (la dalai-lamao), mia radiko-lamao,  
la juvelo kiu plenumas ĉiujn dezirojn (...)  
Tempo venos kiam la suno  
ne plu estos kaŝata de la nuboj.
2. Mia koro estas la Dalai-Lamao.  
Li devis fuĝi el sia naskiĝlando (...)
3. Lia Sankteco restadas en la Bharata lando  
sed liaj benoj revenas ĉi tien (...)
5. Senĉesa torturado ne povas detrui min,  
mi ne estas mortinta...
6. En Tibeto ni agadas por la libereco,  
libereco kiu venas de la Dalai-Lamao (...)
7. La mondoteĝmento estas mia patrujo,  
mia ĉefo estas la enkarniĝo de kompatato kaj  
boneco: lumigataj de la radioj de lia kompatato  
la tibetanoj strebas al neperforto kaj libereco.  
8. La radiko-lamao de Tibeto estas  
la Panĉen-Lamao. Dum li vivis, la malliberuloj  
povis esti tuj liberigitaj el la tibetaj prizonoj.  
La ĉinaj barbaroj likvidis lin.  
Nia nutraĵo estas kiel tiu de porkoj,  
ni estas batataj kaj krude traktataj  
kaj niaj prizonpunoj estas senlimaj.  
Sed tio ĉi neniam ŝanĝos la sistemon  
de la tibeta popolo. Ĝi restos konstanta.
9. Estas kradoj ĉe la fenestroj  
kaj fero sur la pordoj  
en la prizonoj de Tibeto.  
La ĉinoj batas nin.  
Kie estas la libereco kiun ni ĝuis? (...)
11. El mia amara menso  
tristan kanton mi kantas.  
La ĉinoj transformis  
nian Dharmo-landon en prizonegon.  
La senfinaj torturadoj kiujn la ĉinoj trudis al ni  
ne detruis nin. Ni ne estas mortintaj.
13. Rigardante tra la fenestro,  
vidante nenion krom la ĉielo  
kaj la nuboj kiuj ŝvebas en la ĉielo,  
mi tiom ŝatus ke temu pri miaj gepatroj!  
(...) La tempo venos kiam la suno  
de super la nuboj reaperos.
15. Gepatroj de ĉi-vivo, bonvolu ne malĝoji,  
venos la tempo de nia rekuniĝo.  
(...) Ni verŝis tiom da larmoj, ho, tiom da larmoj.
16. Mi ne estas malĝoja, tagoj tagojn sekvas  
kaj venos la tempo de la libereco.

\* 50f (+ sendokostoj) ĉe CSPT, 2 rue d'Agnou, F-78580 Maule  
Vidu n-ron 15 p.12. Profito uzota por la monaĥinoj.

# Raportoj pri Seŭlo kaj pri Katolika Tendaro

## Interreligia konferenco

La ĉeestintoj en IRKE (Inter-Religia Konferenco Esperantista), okazinta la mardon, 26-an de julio posttagmeze, povis kompreni religiajn praktikojn en diversaj landoj. Post enkondukaj vortoj de S-ro Yosimi Umeda (ASISTI-prezidanto), kiu klarigis la signifon de la ĉeftemo: "Ĉu religiaj praktikoj povus transiri naciajn kulturojn?", kvar referantoj prezentis interesajn aktualaĵojn el la religia vivo.

S-ro Hirai Atusi el Japanio prilumis la interreligiajn komunajn diservojn okazantajn jam de deko da jaroj inter Oomoto kaj la Episkopala Eklezio, kiu vere malfermis eblon kundividi la sanktaĵojn. S-ro Sergej Anikejev el Rusio klarigis mikspoton de sep diversaj religiaj praktikoj en la urbo Vladivostoko post malfermiĝo de tiu longe izolita havenurbo, prezentante diversajn epizodojn, kiuj montriĝas pro iusenca invado de novaj praktikoj ne konataj al la urbanoj. S-ro Paul-Joseph de Saily el Aŭstralio koncize rakontis pri la simbiozo de la bahaa kredo kaj esperanto, lige al Lidja Zamenhof, kiu sin dediĉis al tiu movado heredante la idealon de d-ro Zamenhof. S-ino Thérèse Depecker el Francio substrekis la neceson gardi toleremon inter malsamaj religioj, jene:

*"Mi estas katolika, mi kredas tute en Dio kaj Jesuo; kaj mi ankaŭ estas amikino de Francisko el Asizo. Kiel li mi ŝatas la simplan vivon kaj la fratecon kun la naturo. Mi estas tre tolerema. Mi estas feliĉa kiam mi trovas en alikredantoj la saman amon de la aliaj, kaj de la belo, la bono, la paco."*

Antaŭ la fermo de la konferenco ĉiuj ĉeestintoj silente sin okupis per meditado/kontemplado laŭ sia propra maniero.

## Spiritaj studoj

La salonon *Espero Shin* en ĵaŭdo 28-a de julio matene envenis trideko da interesitoj pri kompara studado de religioj. Temas ankaŭ pri jarkunveno de ASISTI (...)

Pro la fakto ke nur du plenrajtaj membroj de tiu asocio ĉeestis, la ĉeestanta ASISTI-prezidanto ŝanĝis la enhavon de la kunveno por celi informi pri tiu neŭtrala faka asocio de studado kaj kunlaborado pri religioj tra la mondo. Post detala pri-trakto de la celoj kaj agadoj de ASISTI, kiu vere celas asisti al interesitoj pri komparado kaj serĉado de religiaj malsamecoj kaj similecoj, kelkaj el la ĉeestantoj prezentis la sialandan aktualan situacion de religia vivo en Ĉinio, Brazilo kaj Japanio.

La kunvenantoj ekstudis fine de la kunveno fragmentojn de la travivaĵoj de Budho, esperantigitajn el sanskrito kaj aperigitajn en *Asistilo*<sup>2</sup>.

1/ El ŝia letero (30-1-1995). La resto de la raportoj, el la kongresa kuriero *Kvieta Mateno* n-ro 6 (29-7-1994), p. 2-3.

2/ Vidu n-rojn 12 kaj 13, respektive p. 22-25 kaj p. 18-21.

## Oni rapide al kutimiĝas...



De dekstre: Dominikana Frato, M-ro K. Otčenášek (Ĉeĥio) kaj P-ro Lajos Kőbor, vicprezidanto de I.K.U.E. (Hungario)

(...) Mi ĝojis dum la ĉi-jara Katolika Esperanto-Tendaro en Sebranice apud Litomyšl (Ĉeĥio, 23/7-5/8/1994). Sentebliis kvanta kaj, precipe, kvalita kresko. Partoprenis pli ol 80 plejparte junaj katolikoj (el Ĉ-S, PL, R, H, NL, D kaj Litovio). (...)

La strikta tendara tagordo aspektas jene: vekigo je 6h30; 5 minutojn poste jam ĉiu partoprenas la matenan gimnastikon; sekvas Sankta Meso, matenmanĝo, "matena ordo" kun hisado de la esperantista flago, diversnivelaĵoj esperanto-kursoj, anĝelusa preĝo, tagmanĝo, posttagmeza libertempo (banado, flugpilkado...), libervolaj rondoj (spiritaj, diskuta kaj sporta grupoj), kantado, rozaria preĝo, vespermanĝo, "vespera ordono", vespera programo (popoldancoj, rakontoj ĉe lignofajro...), ĝis fine, je la 22-a, komenciĝas la "nokta silento".

Ĉiuj, kiuj estas konvinkitaj kaj pri la esperanta ideo kaj pri la kristana kredo, sentas veran felicon en la aranĝo (...). Certe la ĉi-jara tendaro estis la ĝis nun plej sukcesa tiuspeca aranĝo, al kio kontribuis la kreskinta internacieco, la plialtiginta lingva nivelo, la brila ĉi-somera vetero kaj fine altranga vizitanto: la episkopo de Hradec Králové, M-ro Karel Otčenášek, celebris kun ni Sanktan Meson en esperanto. En sia prediko li per plej varmaj vortoj emfazis ke la strebado de la esperantistoj plene kongruas kun la volo de Dio. La reciprokaj komplimentoj inter li kaj la tendaranoj estis plia kontribuo al la ĉie reganta varma kaj amika atmosfero.

Ulrich Matthias\*

\* Selektitaj eliraĵoj el lia artikolo "Ĉu preĝi, ĉu diboĉi?", aperinta en *GEJ-Gazeto* 16,5 (septembro 1994), p. 13-14.

\*\* Kiu jam skribis leteron al la 1-a Interreligia Seminario.

# La Sercado de l' Sankta Gralo

## II - Unua apero de la Gralo

(15,3) A tant descendirent les dames por oïr vespres por la hautesce dou jor. Et quant li rois fu issuz dou mostier et il vint ou palés en haut, si comanda que les tables fussent mises. Et lors s'alerent seoir li chevalier chascuns en son leu ausi come il avoient fet au matin. Et quant il se furent tuit asis par laiencz et il se furent tuit acoisiez, lors oïrent il venir un escroiz de tonoire si grant et si merueilleus qu'il lor fu avis que li palés deust fondre. Et maintenant entra laiencz uns rais de soleil qui fist le palés plus clers a set doubles qu'il n'estoit devant. Si furent tantost par laiencz tot ausi come s'il fussent enluminé de la grace dou Saint Esperit, et comencierent a resgarder li un les autres ; car il ne savoient dont ce lor pooit estre venu. Et neporquant il n'avoit laiencz home qui poïst parler ne dire mot de sa bouche : si furent tuit amui grant et petit. Et quant il orent grant piece demoré en tel maniere que nus d'aux n'avoit pooir de parler, ainz s'entresregardoient autresi come bestes mues, lors entra laiencz li Sainz Graal covers d'un blanc samit ; mes il n'i ot onques nul qui poïst veoir qui le portoit. Si entra par le grant huis dou palés, et maintenant qu'il i fu entrez fu li palés raempliz de si bones odors come se totes les especes terriennes i fussent espandues. Et il ala par mi le palés tout entor les dois d'une part et d'autre ; et tout ainsi come il trespassoit par devant les tables, estoient eles maintenant raemplies endroit chascun siege de tel viande come chascuns desirroit. Et quant tuit furent servi et li un et li autre, li Sainz Graax s'en parti tantost, que il ne sorent que il pot estre devenuz ne ne virent quel part il torna. Et maintenant orent pooir de parler cil qui devant ne pooient mot dire. Si rendirent graces a Nostre Seignor li plusor d'ax de ce que si grant honor lor avoit fete qu'il les avoit repeuz de la grace dou Saint Vessel. Mes sor toz çax qui laiencz estoient en fu li rois Artus joianz et liez, de ce que greignor debonereté li avoit Nostre Sires mostree que a nul roi qui devant lui eust esté.

De ceste chose furent molt lié li privé et li estrange, car bien lor sembla que Nostre Sires nes avoit pas oubliez quant il lor mostroit si grant debonereté. Si en parlerent assez tant come li mengiers dura.

Je tempo malsupreniris la damoj por odi vesprojn pro la hoteco del tago. E kvan la reĝo estis elirinta ell monaĝejo e li venis a l' palaco supre, tiam li komandis ke la tabloj estu mettitaj. E tiam sin allis sidiĝi la kavaliroj ĉiu ĉe sia loko os kiel ili faris je l' mateno. E kvan ili estis ĉiuj sidiĝintaj tie e ili estis ĉiuj trankviliĝintaj, tiam odis ili veni bruegon de tondro tiel grandan e tiel mirindan ke ili opiniis la palacon falonta. E nuk eniris tien radio de suno kiu faris la palacon pli klara je sep duobloj ol ĝi estis antaŭe. Tiam ili tuj estis tute same kiel se ili estus enlumigitaj del graco del Sankta Spirito, e komencis rigardi la unuj la aliajn ; kor ili ne sciis de kie tio potis a ili esti veninta. E tamen ne estis tie homo kiu potis paroli nek diri vorton el sia buŝo. Tiam ili estis tute mutigataj, grandaj e malgrandaj.

E kvan ili estis grandan pecon (da tempo) restintaj en tia maniero ke neniu el ili habis povon paroli, sed sin interrigardis unu la alian kiel mutaj bestoj, tiam eniris tien la Sankta Gralo kovrita de blanka silkotuko ; sed neniam estis iu kiu potis vidi kiu ĝin portis. Tiam ĝi eniris tra la granda pordo del palaco e nuk kiam ĝi tien estis enirinta, estis la palaco plenigita de tiel bonaj odoroj kiel se ĉiuj la teraj spicoj estis tie disŝutitaj. E ĝi allis meze del palaco ĉien ĉirkaŭ la plato<sup>1</sup> ambaŭflanke e tute ĝuste kvan ĝi preterpasis antaŭ la tabloj<sup>2</sup>, estis ili nuk plenigitaj fronte a ĉiuj seĝo, per tiaj viandoj<sup>3</sup> kiajn ĉiu deziris. E kvan ĉiuj estis servitaj, e la unuaj e la aliaj, la Sankta Gralo de tie foriris tiom frue ke ili ne sciis kia ĝi potis esti fariginta nek vidis kiudirekten ĝi turniĝis.

E nuk habis povon paroli tiuj kiuj antaŭe ne potis verbon diri. Tiam donis dankon a Nia Sinjoro la plej parto el ili pro tio ke tiel grandan honoron li ilin faris, ke li ilin repaŝtis<sup>4</sup> per la graco del Sankta Vazo. Sed super ĉiuj kiuj ĉeestis, estis la reĝo Arturo ĝoja kaj leta, pro tio ke pli grandan bonecon Nia Sinjoro montris a li ol a iu ajn reĝo kiu antaŭ li estis.

Pro tiu afero estis multe letaj la proksimuloj e la fremduloj kor bone ŝajnis a ili ke Nia Sinjoro n'ilin forgesis kvan li montris a ili tiel grandan bonecon. Tiam ili parolis pri tio sufiĉe, tiom kiom la mangado daŭris.

1/ Signifas la Rondan Tablon.

2/ Versajne la surtablaj tukoj metitaj sur la Ronda Tablo.

3/ Tiam tio signifis ian ajn pladon, karnan aŭ ne.

4/ Tio signifas : satigis.

\* Alia manuskripto : cent anstataŭ set : "je cent duobloj".

### III - La voto de la Serçado

Et li rois meismes en comença a parler a çax qui plus pres de lui estoient, et dist :

"Certes, seignor, molt devons estre lié et avoir grant joie de ce que Nostre Sires nos a montré si grant signe d'amor qu'il de sa grace nos volt repaistre a si halt jor come le jor de la Pentecouste." - "Sire, fet messires Gauvains, encore i a il autre chose que vos ne savez mie : car il n'a ceanz home qui n'ait esté serviz de quan qu'il demandoit et pensoit. Et ce n'avint onques mes en nule cort, se ne fu chiés le Roi Méhaignié. Mes de tant sont il engignié qu'il nel porent veoir apertement, ançois lor en fu coverte la vraie semblance. Por coi je endroit moi faz orendroit un veu, que le matin sanz plus atendre enterrai en la Queste en tel maniere que je la maintendrai un an et un jor et encor plus se mestiers est ; ne ne revendrai a cort por chose qui aviegne devant que je l'aie veu plus apertement qu'il ne m'a ci esté demostrez, s'il puet estre en nule maniere que je lou puisse veoir ne doie. Et s'il ne puet estre, je m'en retournerai."

Quant cil de la Table Reonde oïrent ceste parole, si se leverent tuit de lor sieges et firent tout autretel veu com messires Gauvains avoit fet, et distrent qu'il ne fineroient ja mes d'errer devant qu'il seroient asis a la haute table ou si douce viande estoit toz jors aprestee come cele qu'il avoient iluec eue. Et quant li rois vit qu'il avoient fet tel veu, si en fu molt a malese : car bien set qu'il nes porra pas retourner de ceste emprise. Si dist a monseignor Gauvain : "Ha, Gauvain, vos m'avez mort par le veu que vos avez fet, car vos m'avez ci tolue la plus bele compaignie et la plus loial que je onques trovasse, et ce est la compaignie de la Table Reonde. Car quant il partiront de moi, de quele ore que ce soit, je sai bien qu'il ne revendront ja mes tuit arriere, ainz demorront li plusor en ceste Queste, qui ne faudra pas si tost come vos cuidiez (...)" Après ceste parole comença li rois a penser molt durement, et en cel penser li viennent les lermes as eulz, si que cil de laiencz s'en porent bien apercevoir. Et quant il parla, si dist si haut que tuit cil de laiencz le porent bien oïr : "Gauvain, Gauvain, mis m'avez le grant corrouz el cuer, dont ja mes ne me porrai esbatre devant que je sache veraïement a quele fin ceste Queste porra torner. Car trop ai grant doute que mi ami charnel n'en reviegnent ja."

E la reço mem komencis paroli pri tio a tiuj kiuj pli proksime de li estis, e diris :

"Certe, sinjoroj, multe debas no esti letaj e habi grandan ĝojon pro tio ke Nia Sinjoro montris a no tiel grandan signon de amo ke li per sia graco volis nin repaŝti je tiel hota tago kiel la tago del Pentekosto."

- "Sinjoro, pondis masinjoro Goven, ankorau estas alia afero kiun vo ne scias : kor ne estas ĉitie homo kiu ne estis servata per kion ajn li petis kaj pensis. E tio ne avenis iam en iu kortego, hor ĉe la Reço Kripla. Sed tiom estis ili ensorĉitaj ke ili ne ĝin potis vidi aperte, sed a ili estis kaŝita la vera aspekto. Pro kio mo, koncerne min, faras nuk mem voton, ke matene sen plu atendi mo eniros en la Serĉadon en tia maniero ke mo ĝin daŭrigos unu jaron e unu tagon e ankorau pli se bezono estos ; e ne revenos a l' kortego pro afero kiu avenos, antau ol mo ĝin vidos pli aperte ol ĝi a mo estis ĉi (tie) montrita, se potas esti en ia maniero ke mo ĝin potos vidi kaj debos. E se tio ne potas esti, mo el tie revenos."

Kvan tiuj del Ronda Tablo odis tiun parolon, tiam leviĝis ĉiuj de siaj seĝoj e faris tute identan voton kiel Goven faris, e diris ke ili ne finos jam plu vagadi antau ol ili sidos ĉe la hota tablo kie tiel dolĉa viando estas ĉiun tagon pretigata kiel tiu kiun ili ĉi tie habis.

E kvan la reço vidis ke ili faris tian voton, tiam li estis pro tio multe misfartanta : kor bone li scias ke li n'ilin potos returni de ĉi tiu influego. Tiam li diris a masinjoro Goven :

"Ah, Goven, vo min mortigis per la voto kiun vo faris, kor vo ĉi (tie) prenis de mo la plej belan kompanaron, e la plej lojalan, kiun mo iam trovis, e tio estas la kompanaro je l' Ronda Tablo. Kor kvan ili foriros de mo, je kiu ajn horo tio estos, mo bone scias ke ili ne revenos jam plu ĉiuj returnen, sed restos la plejparto en tiu Serĉado, kiu ne finiĝos tiel frue kiel vo kredas (...)"

Post tiu parolo komencis la reço pensi multe malĝoje, e dum tiu pensado lin venas la larmoj a l'okuloj, tiel ke bone potis la ĉeestantoj ĝin ekrimarki. E kvan li parolis, tiam li diris tiel laŭte ke ĉiuj ĉeestantoj ĝin potis odi :

"Goven, Goven, min mettis vo en la koron la grandan triston, de kiu jam plu mo ne potos min eligi antau ol mo vere scios a kiu fino tiu Serĉado potos sin turni. Kor tro mo havas grandan dubon ĉu iam maj karnaj amikoj el tio revenos."



## IV - La postuloj de la Serĉado

- "Ha ! sire, fet Lancelot, por Dieu, que est ce que vos dites ? Tex hons come vos estes ne doit pas concevoir poor en son cuer, mes justece et hardement et avoir bone esperance. Si vos devez reconforter : car certes, se nos morions tuit en ceste Queste, il nos seroit graindres honors que de morir en autre leu."

(...) (18,10) Quant les dames et les damoiseles qui avec la reine estoient assises es chambres au souper oïrent ceste novele, si en i ot assez de dolentes et de corrouciees, meesmement celes qui estoient espouses o amies as compaignons de la Table Reonde. (...) (18,33) Et lors comença [la reine] a plorer molt tendrement et ausi firent toutes les dames et les damoiseles qui avec li estoient.

Einsi fu tote la cors troublee por la novele de çax qui partir s'en devoient. Et quant les tables furent levees ou palés et es chambres et les dames furent assemblees avec les chevaliers, lors comença li dualz toz noviax. Car chascune dame ou damoisele, fust espousee fust amie, dist a son chevalier que ele iroit avec lui en la Queste. Si ot laiencz de tiex qui de legier s'i acordassent et qui tost le vousissent, se ne fust uns preudom vielz, vestuz de robe de religion, qui laiencz entra après souper. Et quant il vint devant le roi, si parla si haut que tuit le porent oïr, et dist : "Oiez, seignor chevalier de la Table Reonde qui avez juree la Queste del Saint Graal ! Ce vos mande par moi Nascienz li hermites que nus en ceste Queste ne maint dame ne damoisele qu'il ne chiee en pechié mortel : ne nus n'i entre qui ne soit confés ou qui n'aille a confesse, car nus en si haut servise ne doit entrer devant qu'il soit netoiez et espurgiez de totes vilanies et de toz pechiés mortex. Car ceste Queste n'est mie queste de terriennes choses, ainz doit estre li encerchemenz des grans secrez et des privetez Nostre Seignor et des grans repostailles que li Hauz Mestres mostrera apertement au boneuré chevalier qu'il a esleu a son serjant entre les autres chevaliers terriens, a qui il mostrera les granz merveilles dou Saint Graal, et fera veoir ce que cuers mortex ne porroit penser ne langue d'ome terrien deviser." (...)

(26,19) Si plorerent assez a cel departement cil qui plus cuidoiert avoir les cuers et durs et orgueillox. Mes a tant se test ore li conte d'ax tox et parole de Galaad, por ce que comencemenz avoit esté de la Queste.

a	al	metti la	meti sur tablo(j)n
alli	iri	tablojn	tukon kaj mangilaron
e	kaj	mo	mi
habi	havi	no	ni
hor	krom (se)	nuk	nun
hota	alta	o	oni
kor	ĉar	odi	aŭdi
kordo	koro	os	ankaŭ
kvan	kiam	pondi	respondi
leta	ĝoja	poti	povi
ma	mia	verbo	vorto
metti	meti	vo	vi

- "Ah ! sinjoro, pondas Lancelot, je Dio, kio estas tio kion vo diras ? Tia homo kia vo estas ne debas naski timon en sia kordo, sed justecon kaj firmecon kaj habi bonan esperon. Tiam vo debas rekuragiĝi : kor, certe, se no mortus ĉiuj en tiu Serĉado, a no estus pli grandaj honoroj ol morti en alia loko."

(...) Kvan la damoj e la fraŭlinoj, kiuj kun la reĝino sidis en la ĉambroj je l' vespermanĝo, odis tiun novaĵon, tiam el ili estis sufiĉe multaj malĝojaj e tristaj, tiuj kiuj estis edzinoj same kiel la amikinoj del kompanoj je l' Ronda Tablo (...)

E tiam (la reĝino) komencis plori multe tenere e os faris ĉiuj la damoj e la fraŭlinoj kiuj kun ŝi estis.

Tiel estis la tuta kortego malserenigita de la novaĵo pri tiuj kiuj foriri de tie debis. E kvan la tabloj estis levitaj ĉe l' palaco e en la ĉambroj e la damoj estis kuniĝintaj kun la kavaliroj, tiam komenciĝis la funebro tute nova. Kor ĉiu damo aŭ fraŭlino, ŝi estu edzino aŭ estu amikino, diris a sia kavaliro ke ŝi iros kun li en la Serĉado. Tiam el tiuj estis kavaliroj kiuj estus baldaŭ konsentontaj pri tio kaj kiuj tuj tion votus se ne estus noblomo maljuna, vestita per religiula robo, kiu tien eniris postvespermanĝe. E kvan li venis antaŭ la reĝon, tiam li parolis tiel laŭte ke ĉiuj lin potis odi, e diris :

"Odu, sinjoroj kavaliroj je l' Ronda Tablo, kiuj furis la Serĉadon del Sankta Gralo ! Tion a vo sciigas per mo Nascient la ermito, ke neniu en tiu Serĉado kondukas damon aŭ fraŭlino sen kadi en mortajn pekojn: e neniu ĝin eniru sen esti konfesinta aŭ alli a konfeso, kor neniu en tiel hotan servadon debas eniri antaŭ ol li estas lavita kaj purigita el ĉiuj fiagoj e el ĉiuj mortaj pekoj. Kor ĉi tiu Serĉado ne estas serĉado de teraj aferoj, sed debas esti la esplorado del grandaj sekretoj e del kaŝitaĵoj de Nia Sinjoro e del grandaj misteroj kiujn la Hota Majstro montros aperte a l' bonsanca kavaliro kiun li elektis sia serĝento inter la aliaj teraj kavaliroj, a kiu li montros la grandajn mirindaĵojn del Sankta Gralo e vidigos kion mortaj kordoj ne potus pensi nek lango de homo priparoli."

(...) Tiam sufiĉe ploris ĉe tiu foriro tiuj kiuj plej kredis habi la kordojn duraj kaj fieraj.

Sed je tempo silentiĝas nuk la rakonto pri ĉiuj tiuj e parolo pri Galad, koncerne tion kio estis komenco del Serĉado.

# Por nova, tolera etiko

## Mesaĝo al WCRP\*

Okaze de la 750-a datreveno de la Montsegura ŝtiparo, sur kiu estis mortbruligataj pli ol 200 kataristoj, fino de la "krucmilito kontraŭ la albigensoj",

kelkaj partoprenantoj en la internacia kolo-  
kvo "Montségur : la memoro kaj la famo"  
en Tarascon-sur-Ariège, Foix (fùa) kaj Mont-  
ségur, de la 21-a ĝis 23-a de oktobro 1994,

salutas la delegitojn de ĉiuj religioj kuni-  
ĝontaj en Vatikano kaj Riva del Garda (I) de  
la 1-a ĝis 9-a de novembro por la 6-a Monda  
Sesio de la Religioj por la Paco ;

kaj, memore de ĉiuj kataristoj persekutitaj  
en la XII-a kaj XIII-a jarcentoj, el kiuj sendu-  
be pli ol unu milo mortis ŝtiparumitaj, volas  
rememorigi la devon de ĉiuj religioj toleri  
tiujn kiuj havas malsaman kredon ; la rajton  
je libereco de pensado kaj opinio, kiu estas  
unu el la fundamentaj homrajtoj, rekonita en  
la "Universala Deklaracio pri Homrajtoj", la  
rajton malsame aŭ eĉ tute ne kredi, kaj la  
krimecon de perforta aŭ altruda devigo de  
doktrino aŭ kredo, ia ajn ĝi estu ;

sekve, morale partoprenas en la streboj de  
WCRP kiu agadas por ke la religioj ne plu es-  
tu faktoro de malamo kaj milito sed tute male  
transformiĝu en ilojn serve al la mondpaco.

La kataristoj ne havis alian mesaĝon al la  
mondo ol tiun de la Evangelio kaj de Kristo  
kiu, laŭ ili, ordonis : " (...) ke (la homo) ne  
faru al la aliaj kion li ne volas esti farata al  
li, kaj ke la homo pardonu al kiu faras al li  
malbonon, kaj ke li amu siajn malamikojn,  
kaj ke li preĝu por siaj kalumniantoj kaj por  
siaj akuzantoj kaj benu ilin."

Tia ne ĉiam estis la konduto de tiuj kiuj  
nomis sin disĉiploj de Jesuo-Kristo ; kaj po-  
vus esti bone ke iliaj posteuloj publike kon-  
fesu la etikan eraron kiu la persekutado de  
la kataristoj estis, same kiel tiu de la aliaj  
tiel nomitaj herezaj kristanoj aŭ de la ju-  
doj. Pro zorgo pri justeco kaj historia vereco.

Tiuj partoprenantoj en la kolokvo dankas  
la delegitojn de ĉiuj religioj pro la atento kiun  
ili bonvolos doni al ilia mesaĝo, por ke la me-  
moro de la kataristoj, senkulpaj viktimoj de la  
Inkvizicio kaj de katolika krucmilito, ne ma-  
laperu sed servu por plifirmigi la postulon de  
reciproka toleremo inter ĉiuj religioj kaj  
kredoj, por pli justa, pli luma kaj pli paca  
mondo.

\* Tiu ĉi mesaĝo, proponita de la ASISTI-sekretario dum  
la fina kunsido de la kolokvo, laŭ li ne ricevis sufiĉe da  
aprobaj por esti transdonebla dum la WCRP-Monda Sesio.  
Eĉ ne tute certas ĉu ĝi aperos en la aktoj de la kolokvo.

## Al komuna etiko

Enkonduko. Ni rekonas ke ellaborado de eti-  
ko komuna al la spirita kaj religiaj tradicioj de la  
homaro estas kompleksa tasko : ĝenerala etiko  
kiu ne respektus la apartajn etikojn ne povus esti  
akceptata. Tion ĉi dirinte, ni rekonas la urgecon  
de komuna etiko por fronti kontraŭ la hodiaŭajn  
defiojn : militoj, malsatego, malriĉeco, difekto  
de la naturo, inter- kaj intra-religiaj konfliktoj...

Ni rekonas ke ellaborado de komuna etiko es-  
tas ĉiam provizora entrepreno, ĉiam plibonigen-  
da. Ĝi naskiĝas el viva agad- kaj pripensad-pro-  
cezo, kaj devas konduki al renovigita engaĝiĝo.

1. Niaj etikaj kriterioj, orientitaj de iuj funda-  
mentaj kaj netuŝeblaj valoroj, estas neapartigeblaj  
de spirita enradikiĝo en religia tradicio. Ili tamen  
dependas de siaj diversaj kulturaj kunteksto, kun  
kiuj ni devas kalkuli.

2. Iuj el la agadoj faritaj kaj valoroj transdon-  
taj nome de religioj povis kaj povas esti mal-  
bonaj. Ene de WCRP, per niaj agadoj kaj niaj  
dialogoj, ni provas aperigi la esencajn valorojn de  
ĉiu el niaj religioj, orientitaj al la vivo.

3. Pro la interdependeco de la spirita, de la homa  
kaj de la natura, ni kredas ke niaj agadoj devas a-  
tenti trioblan agmanieron, kiu estu samtempe spi-  
rita (meditado, preĝo), homa (dialoga kaj pluris-  
ma) kaj medikonscia (respekto por la naturo).

4. Ni rekonas kiel esencajn kaj netuŝeblajn valo-  
rojn ene de ĉiuj niaj religiaj tradicioj : la respek-  
ton por la Vivo en kaj trans ĉiu estaĵo, la streba-  
don al la paco kaj al la justeco inter ĉiuj estaĵoj -  
kaj speciale por la pli fragilaj -, la praktikadon de  
kompato al ĉiuj, la favoran elekton de senper-  
fortaj rimedoj, kaj atenteman aŭskultadon de sia  
konscienco. Tiuj ĉi valoroj estas resumitaj per la  
"Ora Regulo" : "Agu kun aliaj

kiel vi deziras ke ili agu kun vi."

5. Kiel membroj de WCRP, tiujn ĉi valorojn ni  
volas praktiki kaj vivigi en ni mem, en niaj  
respektivaj religiaj tradicioj kaj en la interreligia  
kunlaborado. Ni ankaŭ rekonas la bezonon pro-  
poni ilin al internaciaj, naciaj aŭ lokalaj institu-  
cioj kaj provi partoprenigi tiujn ĉi en ili. Speciale  
ni ne volas neglekti la edukadan kampon, por ke  
la junaj generacioj konsciĝu pri la viv- kaj soci-  
elektoj kiuj estas antaŭ ili.

Konkludo. Pro niaj religiaj konvinkoj ni aser-  
tas nian fidon pri la kapableco de la homa estaĵo,  
vojiri kun siaj samspeculoj al la Paco.

Riva del Garda (Italio), 8-11-1994\*

\* Verkita de la franclingva grupo de WCRP-Komisiono  
"Izoleco kaj indiferenteco : serĉe al komuna etiko" : P-ro  
Delahoutre (emerita prof. pri hinduismo kaj budhismo ĉe  
Katolika Instituto en Parizo), Pastoro Dumas, Pastoro Sha-  
fique Keshavjee (hind-devena svisto, kiu verkis tezon pri  
Mircea Eliade), F-ino Anne-Sophie Lamine (franca bahaa-  
nino), Ch. Lavarenne (ASISTI-sekr.), S-ro Adamou N'Dam  
Joya (islama kameruna ministro, unu el la WCRP-prez.),  
kaj rumana ortodoksa pastro. (La du lastaj ne povis ĉeesti la  
finan redktadon kaj do ne rekte korespondencas pri la teksto.)

# Raporto de agado ĉe la 6-a Monda Sesio de WCRP en Vatikano kaj Riva del Garda (Italio)

Post dutaga aŭta vojaĝo, la ASISTI-sekretario alvenis al Varone (apud Riva del Garda), la 26-an de oktobro 1994, je la 23-a kaj duono, kie tamen ankoraŭ kunvenis komitato, tiel ke li povis saluti Patrice Brodeur, la "Kunordiganto de la MKRP-Junularo", kiun li jam renkontis en Bangaloro kaj Cluny (kluni) la antaŭan jaron<sup>1</sup>.

Krom lia normala partopreno en la junulara renkontiĝo, li povis kontribui al la plantado de arboj de paco en la apuda urbeto Arco (arko) per laŭtlegado de parto el la "Preĝo sub la verda standardo", kun angla traduko, en ĉeesto de trideko da homoj (el kiuj la urbestro ktp.), la sabaton aŭ dimanĉon posttagmeze.

La dimanĉon vespere (la 30-an de oktobro), Patrice donis al li la eblecon rapide prezenti ASISTI (en 5 minutoj) antaŭ ĉiuj (ĉ. 120 gejunuloj, de trideko da landoj). Kaj li disdonis al interesitoj kelkajn flugfoliojn "What is ASISTI" (Kio estas ASISTI?) kun angla traduko de la "Preĝo sub la verda standardo" dorsflanke.

Dank'al bahaĵo junulino, tradukisto deĵoranta pri la kontaktoj kun la ĵurnalistoj, li povis fakte registriĝi kiel ĵurnalisto por la Monda Sesio.

La 2-an de novembro li do povis partopreni en gazetara renkontiĝo ĉe la Pittigliani Juda Centro en Romo, plie de la sekvataga oficiala malfermo en Vatikano en ĉeesto de la Papo.

La 4-an de novembro, bonŝance la afrikana Kardinalo Francis Arinze, prezidanto de la (Ĉef)-Pontifika Konsilio por Interreligia Dialogo, alvenis ĉe la "Keynote Adresses" iomete tro malfrue por sidi ĉe la unua seĝovico, kaj do hazarde venis sidiĝi apud li! Li kaptis la okazon por doni al li Asistilon n-ro 15 kun franca suplemento (kie temas sur la unua paĝo pri la subteno al ASISTI de M-ro Velk, ĵus elektita kardinalo, kaj alia ĉefa episkopo, plie de la esperantlingva saluto de la Papo okaze de Pasko), kaj prezenton de ASISTI.

Same, dum kunveno de la komisiono pri monda etiko en kiu partoprenis nur unu fojon d-ro Hans Küng, la verkinto de la 1993-a Ĉikaga Deklaracio "Al Monda Etiko", li sukcesis doni al li ekzempleron de Asistilo n-ro 15 precizigante ke "lia" Deklaracio estis parte tradukata ankaŭ en esperanto<sup>2</sup> (ĉar li bedaŭris ke ĝi ne sufiĉe diskoniĝis, en sia "Keynote Address" la antaŭan tagon).

## Pri aligo de ASISTI

Li tre rapide salutis d-ron Aram, la (eksan?) Moderator de la Ekzekutiva Komitato de WCRP, kiu diris ke li memoras pri nia aliĝpeto sed tamen petis ke li donu kopion de sia fakso. La sekvan fojon li enmanigis al li la tutan dosiereton<sup>3</sup>.

Sed la lastan tagon li parolis pri nia aliĝo kun Patrice, kiu diris ke pro la troa laboro ĝi ne povis esti pritaktata kvankam li memoris ke ĝi alvenis al la Novjorka sidejo. Kaj pro la probabla ŝanĝo de Moderator sekve de la voĉdonoj, li konsilis al

li denove sendi dosieron al la nova, kiam li estos elektita; sed li asertis ke, laŭ li, nia aliĝo estos senproblema. Se bone komprenite, temas pri "Affiliate membreco" (kiu kostas nur 50 \$).

Plie li donis al la Moderator de la komisiono pri Etiko, d-ro Adamou N'Dam N'Joya, islama ministro de Kamerunio reelektita kiel unu el la 28 prezidantoj de WCRP, 12-paĝan franclingvan "Histoire d'ASISTI" (Historio de ASISTI), montrante al li ke Zamenhof jam proponis neŭtralan etikan ponton antaŭ preskaŭ unu jarcento.

Tiu komisiono partatempe dividiĝis en laŭlingvaj grupoj (germanlingva, anglalingva, itallingva kaj franclingva), kaj la lia (6-homa, plus d-ro N'Dam N'Joya nur partatempe) verkis tekston tre laŭdatan de la komisiono, kiu uzis ĝin preskaŭ sensange kiel enkondukon al sia fina deklaro.<sup>4</sup>

## Publikaj preĝoj en esperanto

Ĉe la Ceremonio por Paco en Rovereto (kie staras plurtuna "pacosonorilo") li ne povis diri preĝon en esperanto ĉar pro pluvego la subĉiela ceremonio estis mallongigata. Sed dum la Ferma Ceremonio oni permesis al li envicigi inter la dekkvino da reprezentantoj de religioj: verŝajne antaŭ 700-800 homoj<sup>5</sup>, li laŭlegis la unuan kaj trian strofojn de la "Preĝo sub la verda standardo" en esperanto kun posta angla traduko kaj proksimume jena enkonduko: "This is a prayer in Esperanto written in 1905 by Dr Zamenhof, who wanted also to make a neutral bridge between the religions at the very beginning of this century".<sup>6</sup>

(Ankaŭ germana esperantista bahaĵo jam laŭlegis bahaĵon preĝon en esperanto, dum matena komuna preĝo.)

Dum la tuta Sesio, pli ol 200 partoprenantoj ricevis aŭ prenis mem la flugfoliojn *What is ASISTI* kun, dorsflanke, aŭ la angla traduko de la *Preĝo sub la verda standardo*, aŭ la unua paĝo de *Reasons of joining WCRP*.

Kaj li ricevis promesojn de almenaŭ sikho, ĝinano (ĝaino), zoroastrano kaj korea budhista monaĥo, ke ili sendos al li tekstojn el siaj sanktaj skriboj por la religia antologio.

Fine, reveninte en Francion li estis intervjuata la 16-an de novembro ĉe sia radio-elsendejo, dum ĉirkaŭ 5 minutoj enkadre de la vesperaj lokaj informoj<sup>7</sup>, pri la Monda Sesio.\*

\* Laŭ letero de la sekretario al la prezidanto, 16-11-94.

1/ Vidu raportojn pri ambaŭ en Asistilo n-ro 14 p.4-5.

2/ Vidu Asistilon n-ro 15 p.4.

3/ T.e. aliĝpeto letero, prezento *What is ASISTI*, "Reasons of joining WCRP" (Kialoj aliĝi al la Monda Konferenco pri Religio kaj Paco), kaj Asistilo n-ro 15.

4/ Vidu ties tradukon sur apuda paĝo.

5/ Ĉar inuj el la ĉ. 1000 partoprenantoj estis jam foririntaj.

6/ *Tio ĉi estas preĝo en esperanto verkita en 1905 de D-ro Zamenhof, kiu ankaŭ volis konstrui neŭtralan ponton inter la religioj ĉe la komenco de tiu ĉi jarcento.*

7/ Laŭtakse ĉiutage aŭskultataj de ĉ. 10.000 homoj.

# Pri William Penn (1644-

Ĉirkaŭ tiu tempo (1675) aperis la famega William Penn, kiu estigis la potencon de la kvakeroj en Ameriko, kaj kiu igus ilin respektataj en Eŭropo se la homoj povus respekti la virton sub ridinda aspekto ; li estis unika filo de la kavaliro Penn, vicadmiralo de Anglio kaj favorato de la duko de York, ekde Jakobo la II-a.

Vilhelmo Penn, 15-jara, renkontis kvakeron en Oksfordo kie li studis ; tiu kvakero persvadis lin, kaj la junulo, kiu estis lerta, nature elokventa, kaj kies fizionomio kaj manieroj imponis, baldaŭ gajnis kelkajn el siaj kamaradoj. Li iom post iom estigis societon de junaj kvakeroj kiuj kunvenis ĉe li ; tiel ke li fariĝis ĉefo de la sekto, 16-jara.

Revene ĉe la vicadmiralo sia patro, ĵus fininte siajn kolegiajn studojn, anstataŭ surgeniĝi antaŭ li kaj peti lian benon, laŭ la kutimo de la Angloj, li alpaŝis al li kun la ĉapelo sur la kapo kaj diris al li : *"Mi estas tre kontenta, amiko, vidi cin bonfartanta"*. La vicadmiralo kredis ke lia filo estis frepeziĝinta ; li baldaŭ ekkomprenis ke li estis kvakero. Li uzis ĉiujn rimedojn kiujn la homa prudento povas utiligi, por inklinigi lin vivi kiel la aliaj ; la junulo respondis al sia patro nur instigante lin fariĝi mem kvakero !

Fine la patro malrigoriĝis ĝis ne peti de li ion alian krom ke li alproksimiĝu la reĝon kaj la dukon de York kun la ĉapelo subbrake, kaj ne ci-diru al ili. Vilhelmo respondis ke lia konscienco ne permesis tion al li ; kaj la patro, indignita kaj malesperiginta, forpelis lin el sia domo. La juna Penn dankis Dion pro tio ke li jam eksuferis por lia afero : li iris prediki en la *Urbo*, kaj li varbis tie multajn prozelitojn.

Tagon post tago la predikoj de la pastoroj havis pli kaj pli maldensan ĉeestantaron ; kaj ĉar Penn estis juna, ĉarma kaj bela, la virinoj de la kortego kaj de la urbo devote pelis sin por aŭskulti lin. La patriarko George Fox venis, el la fundo de Anglio, viziti lin en Londono pro lia famo ; ambaŭ decidis fari misiojn eksterlande. Ili enŝipiĝis por Holando, lasinte sufiĉe multajn laboristojn por zorgi pri la vinberejo de Loudono. Iliaj laboroj feliĉe komenciĝis per sukceso en Amsterdamo ; sed kio plej honorigis ilin, kaj kio plej endanĝerigis ilian humilecon, tio estis la akcepto kiun faris al ili la palatina princino Elizabeta, onklino de Georgo la I-a, reĝo de Anglio, virino fama pro sia spirito kaj pro sia scio, kaj al kiu Kartezio dediĉis sian romanon de filozofio.\*

Ŝi tiam estis izoliĝinta en Hago, kie ŝi vidis la amikojn, car tiel oni tiam nomis la kvakerojn en Holando ; si havis plurajn interparoladojn kun ili ; ili ofte predikis ĉe ŝi, kaj se ili ne faris el ŝi perfektan kvakerinon, ili almenaŭ konfesis ke ŝi ne estas for de la regno de la ĉieloj.

La amikoj semis ankaŭ en Germanio, sed ili rikoltis malmulte. Oni ne ŝatas la modon ci-diru en lando kie oni devas ĉiam uzi la vortojn Alteco kaj Ekscelenco. Penn baldaŭ retransiris al Anglio, pro la novaĵo pri la malsaneco de lia patro ; li venis ricevi liajn lastajn elspirojn. La vicadmiralo reamikiĝis kun li, kaj brakumis lin kun tenereco kvankam li estis malsamreligiano ; sed Vilhelmo vane instigis lin ne ricevi la (lastan) sakramenton (t.e. la krismo de malsanuloj) kaj morti kiel kvakero ; kaj la maljunulo senutile admonis lin ke li surmetu butenojn sur siaj manikoj kaj galonojn ĉe sia capelo.

## "Pen-arbaranio"

Vilhelmo heredis grandajn posedaĵojn, inter kiuj troviĝis reĝaj ŝuldoj pro pruntedonoj faritaj de la vicadmiralo en maraj ekspedicioj. Nenio tiam estis malpli sekurigita ol la mono ŝuldata de la reĝo : Penn estis devigata iri ci-diru al Karlo la II-a kaj liaj ministroj pli ol unufoje por la repago. La registaro donis al li, en 1680, anstataŭ monon, la proprieton kaj suverenecon de amerika provinco, sude de Marilando : jen kvakero iĝinta suvereno. Li foriris al siaj novaj Ŝtatoj kun du veseloj ŝarĝitaj per kvakeroj kiuj sekvis lin. Ekde tiam oni nomis la landon Pensilvanio, laŭ la nomo de Penn ; li fondis tie la urbon Filadelfio (laŭvorte : fratamio), kiu hodiaŭ estas tre prospera. Li komencis per tio, ke li faris ligon kun la Amerikanoj, siaj najbaroj : ĝi estas la ununura traktato inter tiuj popoloj kaj la kristanoj, kiu ne estis ĵurata kaj kiu ne estis rompata. La nova suvereno estis ankaŭ la leĝofaranto de Pensilvanio ; li donis tre saĝajn leĝojn, el kiuj neniu estis ŝanĝata post li. La unua estas ne malbone trakti iun pri la religio, kaj rigardi kiel gefratojn ĉiujn kiuj kredas je dio.

Tuj post kiam li establis sian guberniadon, pluraj negocistoj de Ameriko venis popoli tiun kolonion. La indigenoj de la lando, anstataŭ fuĝi en la arbarojn, iom post iom alkutiĝis kun la pacaj kvakeroj ; kiom ili malŝatis la aliajn kristanojn de Ameriko, konkere-

1718)

de Voltero (1694-1778)

majn kaj detruemajn, tiom ili amis tiujn ĉi novvenintojn. Post mallonga tempo tiuj t.n. sovaĝuloj, ĉarmitaj de siaj novaj najbaroj, amase venis peti Vilhelmon Penn, ke li ricevu ilin inter siajn vasalojn. Tio estis tre nova spektaklo, tiu suvereno kiun ĉiuj ci-dirante al-parolis, kaj kun la ĉapelo sur la kapo, registaro sen pastroj, popolo sen armiloj, civitanoj ĉiuj egalaj, krom magistratenco, kaj najbaroj sen ĵaluzo.

Vilhelmo Penn povis fieri, ke li alportis sur teron la oran tempaĝon pri kiu oni tiom parolas, kaj kiu verŝajne ekzistis nur en Pensilvanio. Li revenis en Anglion por la aferoj de sia nova lando post la morto de Karolo la II-a. La reĝo Jakobo, kiu estis aminta lian patron, havis la saman amikemon al la filo, kaj ne rigardis lin kiel nekonatan sektulon sed kiel tre grandan homon. La politiko de la reĝo akordigis en tio kun lia gusto ; li deziris flati la kvakerojn aboliciante la leĝojn kontraŭ la nekonformistoj, por povi enkonduki la katolikan religion dank'al tiu ĉi libereco. Ĉiuj sektoj de Anglio vidis la kaptilon, kaj ne lasis sin kapti en ĝi ; ili ĉiam estas kunligitaj kontraŭ katolikismo, sia komuna malamiko. Sed Penn ne opiniis ke li devas rezigni siajn principojn por favori protestantojn kiuj malamamis lin, kontraŭ reĝo kiu lin amis. Li estis stariginta la liberecon de konscienco en Ameriko, li ne deziris ŝajni voli detrui ĝin en Eŭropo ; li restis do fidele al Jakobo la II-a, tiom ke li estis ĝenerale akuzata esti jezuito. Tiu ĉi kalomnio videble afliktis lin ; li estis devigata senkulpigi sin pri tio ĉi per publikaj skribaĵoj (...)

Ĉiuj anglaj sektoj ricevis de Vilhelmo la III-a kaj de ties parlamento tiun saman liberecon kiun ili ne volis akcepti el la manoj de Jakobo. Tiam la kvakeroj ekĝuis, per la forto de la leĝoj, ĉiujn privilegiojn kiujn ili hodiaŭ posedas. Penn, post kiam li finfine vidis sian sekton establita sen kontraŭdiro en sia naskiĝlando, reiris en Pensilvanion. La liaj kaj la Amerikanoj akceptis lin kun larmoj de ĝojo, kiel patron kiu revenis viziti siajn infanojn. Ĉiuj liaj leĝoj estis religie observataj dum lia foresto, kio okazis al neniuj legfarintoj antaŭ li. Li restis dum kelkaj jaroj en Filadelfio ; li fine foriris, malgraŭvole, por iri peti en Londono novajn avantaĝojn favore al la komerco de la Pensilvanoj : li ne plu revidis ilin ; li mortis en Londono en 1718.

4-a el la *Filozofiaj leteroj* (1734): *Pri la kvakeroj*.

\* Mi tradukas laŭvorte, ne sciante pri kiu verko li aludas.

## Preĝo al Dio

de Voltero

Ne plu al la homoj mi alparolas, sed al ci, Dio de ĉiuj estaĵoj, de ĉiuj mondoj kaj de ĉiuj tempoj : se al feblaj kreitaĵoj perditaj en la vastegaĵo, kaj nepercepteblaj de la resto de la universo, permesate estas aŭdaci peti ion de ci, ci kiu ĉion donacis, ci kies dekretoj estas neŝanĝeblaj same kiel eternaj, degnu rigardi kun kompatato la erarojn ligitajn al nia naturo ; por ke tiuj eraroj ne iĝu niaj plagoj. Ci ne donis al ni koron por ke ni nin reciproke malamu, kaj manojn por ke ni nin buĉu ; faru ke ni helpu unu al la aliaj elteni la ŝarĝon de pena kaj transira vivo.

Ke la etaj diferencoj inter la vestaĵoj kiuj kovras niajn debilajn korpojn, inter ĉiuj niaj mankaj lingvoj, inter ĉiuj niaj ridindaj kutimoj, inter ĉiuj niaj neperfektaj leĝoj, inter ĉiuj niaj sensencaj opinioj, inter ĉiuj niaj situacioj tiel misproportiaj en niaj okuloj, kaj tiel egalaj antaŭ ci ; ke ĉiuj ĉi etaj diferencoj kiuj distingas la atomojn nomitajn homoj, ne estu signoj de malamo kaj persekutado ; ke tiuj kiuj ekflamigas kandelojn plentagmeze por gloriĉin eltenu tiujn kiuj kontentigas per la lumo de sia suno ; ke tiuj kiuj kovras sian robon per blanka tolaĵo por diri ke oni devas ami ĉin ne malsimpatiu tiujn kiuj diras la saman sub nigralana mantelo ; ke egale estu adori ĉin en ĵargono, formita el malnova lingvo, aŭ en ĵargono pli nova.

Ke tiuj kies vestaĵo estas ruĝe aŭ viole tinkturita, kiuj regas super eta eco el eta amaso de la koto de tiu ĉi mondo, kaj kiuj posedas kelkajn rondajn fragmentojn de iu metalo, ĝuu sen fiereco kion ili nomas grandeco kaj riĉeco, kaj ke la aliaj vidu ilin sen envio : ĉar ci scias ke estas en tiuj vantaĵoj nek io enviinda nek io fierinda.

Ĉiuj homoj povu memori ke ili estas fratoj ! Ili malamegu la tiranecon truditan al la animoj, kiel ili abomenas la rabadon kiu perforte ŝtelas la frukton de la paca laboro kaj farado ! Se la militoj estas neeviteblaj, ni ne malamu, ni ne disŝiru unu la aliajn en la sino de paco, kaj ni uzu la momenton de nia ekzistado benante egale en mil diversaj lingvoj, de Siam ĝis Kalifornio, cian bonecon kiu donis al ni tiun ĉi momenton.

El *Traité de la tolérance* (Traktato pri tolero), 1763, c. 23.

# Tiel mortis Abraham Halter,

Oni ne scias ekzakte kiel mortis Lidja Zamenhof, eĉ ne certe kiam. Ĉi-paĝoj, el la fino de aŭtobiografia romano de neesperantista verkisto, eble helpas imagi kiaj estis la lastaj jaroj de ŝia vivo en la varsovia getto.\*

(...) Salomono revenis al Varsovio nur post sep jaroj, en marto de la jaro 5688-a post la kreado de l' mondo fare de la Eternulo - Li estu benata ! Tio estas printempe 1928. Li estis fariĝonta 23-jara. Ĉe la Judoj oni preparis la Paskon (...)

Salomono rigardis sian patron kvazaŭ unuafoje, kaj malkovris preskaŭ 50-jaran viron, grandan sed iomete kurbigitan kiel multaj presistoj, kun trankvilaj okuloj, kaj jam griza barbo. Abrahamo anoncis al li la foriron de liaj du fratoj Davido kaj Samuelo. La unua, persekutata de la polico pro siaj sindikataj aktivecoj ĉe la ledlaboristoj, rifuĝis en Francio kaj vivis en Parizo. La dua, granda admiranto de D-ro Zamenhof, diskonigis ie en Eŭropo la novan universalan lingvon, esperanto.

Abrahamo nun laboris ĉe la presejo de la gazeto de la judaj popolistoj, *Der Moment*, "La Momento", kaj loĝis ĉe la n-ro 35 de strato Nowolipie, ne malproksime de sia antaŭa loĝejo (...)

Pro la reveno de Salomono, Abrahamo volis ke tiun jaron la Seder<sup>1</sup> alprenu tute solenan karakteron. Moniek, la edzo de lia filino Topcia, pligrandigis la tablon kiu nun okupis preskaŭ la tutan salonon. Topcia aranĝis la manĝilaron sur la tablo same kiel faris ŝia patrino - ŝia memoro estu benata ! - antaŭe, kiam ĉiuj infanoj estis hejme (...)

Salomono ne konis persone ĉiujn kiu sidigis ĉirkaŭ la paska tablo (...) Ankaŭ ĉeestis la kuzo Mordeĥaj, tiu kiu estis foririnta antaŭ sep jaroj al Palestino. Li estis reveninta en Pollandon por kunlabori en la trejnado de junaj *halutzim* (pioniroj). Li amikino, Droza, naskiĝinte en Galilea kibuco, akompanis lin : mirige por ĉiuj ŝi parolis nur la hebrean. Abrahamo legis la *Haggadah*<sup>2</sup>. Li aspektis feliĉe. La lumo de la kandeloj dansis en lia rigardo. Post la manĝo li ekkantis kelkajn hasidajn melodiojn, tuj kunkantatajn de Topcia kaj Moniek ; kaj Mordeĥaj rakontis la vivon "en la lando" kaj ankaŭ kantis kelkajn refreojn de pioniroj. "Ni venis konstrui la landon kaj esti rekonstruataj de ĝi", diris unu el tiuj kantoj (...)

La 1-an de septembro 1939 ĉe la tagiĝo, la germana armeo transiris la landlimon. Estis por la Judoj la antaŭtago de sabato, tri semajnojn antaŭ Yom Kippur, la tago de la Granda Pardonado (...)

La gazetoj ankoraŭ aperis kaj la sekvan tagon, kiel ĉiutage, Abrahamo iris al sia laborejo (...)

La 23-an de septembro, tagon de la Kippur, sinsekvaj ondoj da Messerschmitt-aviadiloj dum horoj bombis la urbon : Hitler decidis "ekflamigi kandelon por la varsoviaj Judoj" (...)

La 1-an de oktobro, la suno ankoraŭ estis varma en Varsovio. La eldonistoj de "La Momento" decidintis reaperigi la gazeton por doni al la Judoj novaĵojn pri la mondo. Abrahamo kiu tien iris pasante laŭ Karmelickaŝtrato, vidis silentan homamason dense iri al strato Leszno. Li sekvis ĝin.

En strato Leszno sekvis unu la alian malrapidaj kamionoj olivverdaj, plenaj de soldatoj kun kaskoj. Abrahamo neniam vidis germanajn soldatojn, sed sciis ke temis pri ili. Li estis mirigita de sia propra trankvileco. Sed ĉu ne estas skribite : "Ne estas donite al ni kompreni kial la malbonuloj prosperas kaj la justuloj suferas". Li eligis sin el la homamaso, lasis malantaŭ si la bruon de la raŭpoj sur la pavimeroj de sia urbo, kaj iris presi la lastan numeron de "La Momento" (...)

Post unu jaro (...) Abrahamo pasis la tagon de Kippur en la malgranda sinagogo de strato Nowolipki, kie li kutimis preĝi. Vespere la celebranto, surmetinte sian ceremonian kostumon kaj kovrita de sia preĝa ŝalo, pretigis sin reciti la *neilah*, la preĝon de fermiĝo - t.e. la fermiĝo de la ĉielaj pordoj - kiam knabo aperis : la Germanoj, li diris kun okuloj grandigitaj pro la graveco de la novaĵo kiun li alportis, la Germanoj estis limigontaj la getton per muro kaj pikdratoj. La viroj ĝemis. Kelkaj, panikitaj, kurante eliris. La celebranto rifuzis diri la preĝon. Ĉar, li demandis, kiel eblas preĝi kiam fermiĝas la "pordoj de la graco" ?

Tiu ĉi rifuzo de la rabeno fermi la Kipuron, profunde malserenigis Abrahamon. Hejmen reveninte li sendis unu el la infanoj de Topcia venigi Mordeĥaj, la "palestinan" kuzon. Mordeĥaj tuj alvenis (...)

- Mordeĥaj, Abrahamo diris, mi opinias ke... ke temp' estas agi.

Mordeĥaj suprigis la brovon, kvazaŭ li ne bone aŭdintus :

- Vi, Rab Abraham? Vi volas ekpreni armilojn ?  
- Kial armilojn ? Kiu parolas pri armiloj ? Kial ni devus uzi la samajn rimedojn kiel Amalek, nia malamiko ?

- Vi parolis pri ekagado, Rab Abrahamo...

Abrahamo atendis ke Topcia estas fininta versi la teon :

- Kaj se ni presus gazeton ? li diris.

- Gazeto por alvoki al la ribelo ?

- Por informi.

- Kiel vi farus por presi ĝin ? Tio ĉi estas danĝera, Rab Abraham.

- Mi ankoraŭ havas en la kelo iom da materialo de nia antaŭa presejo. Sed mi bezonas paperon, Mordeĥaj.

- Nu<sup>3</sup> ?

- La paperon mi trovis. Ĉe la manĝodisdonejo, en Zamenhofstrato. Mi parolis pri tio kun la respondeculoj. Ĝus antaŭ la milito ili aĉetis amason da papero por servi kiel tablotuko, ili ne plus bezonas tion. Nur ke estu io por manĝi... Necesus ke ci mobilizu ciajn pionirojn por transporti ĝin kaj helpi al mi ĉion aranĝi.

Mordeĥaj remetis sian tason sur la tablon.

- Vi estas stranga Judo, Rab Abraham !

# presisto en Varsovio

Por Sukkoth, en la plenplena getto regis malĝojo kaj mizero. La vera mizero, tiu kiu kaŭzas hororon kaj abomenon. Malgraŭ la malpermeso de la *Kommandantur*, grupo da *hasid*-oj decidis honori la Toraon. Tio okazis ĝuste, en Zamenhof-strato, antaŭ la manĝodisdonejo. Ili ekdancis, ekturnigadis, kaj ili turnigis pli kaj pli rapide, kaj ili kantis pli kaj pli laŭte. Ili baldaŭ atingis tian ekstazon, ege trans la mizero kaj la pikdratoj, ke ili ne plu povis halti. Tio estis maljuna judino aĉe vestita, kiu revenigis ilin al la realo :

- Judoj ! Ŝi vokis. Savi sian vivon estas unu ordono de la Tora. Kanti hodiaŭ estas danĝere ! Ĉesu !

Ili iom post iom haltis kaj silentigis, kiel meŝianismo kiu rompiĝas. Ili ŝanceliĝis, retrovis sian homan pezecon kaj la aflikton de la strato.

La pioniroj de Mordeĥaj malatentige translokiĝis la rismojn, purigis la kelon, instalis la perbrakan presmaŝinon kiu antaŭe servis por presi la presprovaĵojn, akiris kelkajn inkoskatolojn kaj konektis malnovan radiofonon per kiu iu sukcesis ricevi Radio-Londonon kaj Radio-Moskvon.

La unua numero de *Yediess* (jedjes), "Novaĵoj", verkita en la jida, aperis la 15-an de novembro : kvar ambaŭflanke presitaj folioj, kies ĉiuj nur tricent ekzempleroj tuj elĉerpiĝis. La tagon mem, la Gestapo ĉirkaŭis la kvartalon - verŝajne ili estis informitaj de la juda polico, kies sidejo estis ne malproksime de la loĝejo de Abrahamo, ĉe n-ro 13 de strato Leszno. Priserĉadoj estis farataj en pluraj domoj de strato Nowolipie, sed sen rezulto. Por la junaj pioniroj, la venko estis grava, kaj ili ne kaŝis sian admiron al Abrahamo, kiun ili nomis, hebree, *Ha-zaken*, "la Maljunulo"

(...) La postmorgaŭon vespere, la 17-an de novembro 1940, la getto estis ĉirkaŭmurigata (...)

Perl, la edzino de Salomono, kaj ilia filo Meir-Itiel, venis loĝi en strato Nowolipie. Abrahamo estis ĝoja pro la ĉeesto ĉe li de la filo de Salomono. Li fojfoje malsuprenvenigis lin al la kelo, solan aŭ kun lia patrino (...) Iun vesperon kiam ili ĉiuj tri estis tie, aŭdiĝis bruo ĉe la ŝtuparo (...) Oni frapis je la pordo (...) Malnova pola amiko de Perl staris tie kun du nekonatuloj.

- Jarek ! Perl krietis, kion ci faras en la getto ?

- Salomono atendas vin dudek kilometrojn for de ĉi tie, apud Majdan. Mi forkondukos vin. Ni devas hasti.

Li prezentis siajn du kunulojn :

- Ili estas niaj gvidantoj. Tiu ĉi estas mia kuzo, la alia, iu amiko.

Denove, paŝoj ĉe la ŝtuparo. Ĉi-foje temis pri Mordeĥaj kaj la pioniroj, kun revolvero ĉemane. Oni estis informinta ilin ke tri nekonatuloj eniris en la domon.

- Hastigendas, rediris Janek Kobyla.

Li rapide klarigis al Mordeĥaj ke ili alvenis tra la kloakoj, kaj ke ili venis forkonduki la patron,

la edzinon kaj la filon de Salomono.

- Vi ne plu povas foriri, Mordeĥaj diris. Ili estas ĉirkaŭantaj la tutan kvartalon (...)

Estigis silento. La homoj, starantaj, observis unu la aliajn. Subite, rompante la silenton, Abrahamo diris :

- Estas pasejo.

Mordeĥaj kontraŭvole depuŝis unu el la tendolitoj, forigis kelkajn tabulojn, malkaŝante nigran kvadratan truon sesdekcentimetran. Pli freŝa aero eniris en la kelon. Janek, nekredema, alproksimiĝis. Oni konfidencis al li ke li povos laŭ la subteraj kanaloj atingi straton Wronia.

- Mi konas la pasejon de strato Leszno al strato Wronia, lia kuzo konfirmis.

- Sed...

Janek Kobyla ne komprenis :

- Sed do, li reparolis, se vi povas foriri, kial vi restas ĉi tie ? (...) Perl, nepras sin peli ! Venu, *panie* Abraham.

- Ne, Abrahamo diris, mi restas. Forkonduku Perl-on kaj la infanon. Brakumu mian filon, kaj Dio benu vin !

- Ni tuj pasos en subteraĵoj, Perlo klarigis al Meir-Itiel. Ci ne devos timi, nek plori. Ci promesas al mi ? Ni iras rekuniĝi kun pacjo (...)

*Mi ne plu memoras ke mi eliris laŭ la kloakoj, mi nur memoras ke mi timis. Ni rekuniĝis kun mia patro. Pli poste, patrolo de la ruĝarmeo arestis nin en la glaciaj ebenoj de Ukrainio. Oni unue kondukis nin al Moskvo sub la bomboj, poste oni sendis nin en Uzbekistanon, al Kokand (...)*

*Revene al Pollando (...) dum tie en Erec-Israel la Judoj batalis por juda stato, mi rigardis min kiel mobilizitan tie kie mi estis : mi fariĝis unu el la respondeculoj de la boroĥovista junularo, maldestra cionista movado (...)*

*Mi enlite kuŝis pro malbona pneŭmonito kiam miaj amikoj de la boroĥovista junularo enŝipiĝis al la "Promesita Lando", sur ŝipon plenplenan de judaj rifuĝintoj, kiu nomiĝis "Exodus" (...)*

## Tagĵurnalo de Abrahamo

2-an de oktobro. La jaron 5703-an<sup>4</sup> post la kreado de l'mondo fare de la Eternulo - Li estu benata ! Mordeĥaj kaj Hersch iris, tra la subteraĵo, al la arja flanko. Ili aĉetis seppafan revolveron, kiun ili pagis dumil zlotojn, kaj kvar skatolojn da dinamito kontraŭ kvin mil zlotoj. Mi donis al ili mian tutan ŝparaĵon por ke ili aĉetu armilojn. Ĉar nun ĉiuj limtempoj finiĝis. Ni rezistis kiel neniu faris antaŭ ni : per la parolo kiun la Eternulo donis al ni por ke ĝi eniru en la koron de niaj turmentistoj; per la atestado kiu, se tio estas la volo de la Sinjoro Cebaoth, gardos nian spiron inter la nacioj por la eterno. Kaj nun - sankta, sankta, sankta estas Cia nomo ! - restas al ni nur la mortigo por kontraŭigi al tiuj kiuj alportas la morton, la glavo, al

tiuj kiuj frapas per la glavo, por ke Cia nomo, Sinjoro, kaj la nomo de Cia popolo estu glorataj por ĉiam, amen!

27-an de oktobro. La jaron 5703-an post la kreado de l'mondo (...) Oni donis al mi grenadon kaj klarigis ties manuzon. "Ci, Tre Sankta, kies trono estas ĉirkaŭata de la laŭdoj de Israelo, al Ci konfidis sin niaj patroj. Ili fidis kaj Ci liberigis ilin". Kial ne nin? Kial ne nin, Sinjoro?

16-an de januaro. La jaron 5703-an post la kreado de l'mondo fare de la Eternulo - Li estu benata! (...) Mi ĵus relegis kelkajn el tiuj ĉi notoj kaj ne rekonas min: ĉu la malfeliĉo tiom ŝanĝas nin?

17-an de januaro. La jaron 5703-an post la kreado de l'mondo fare de la Eternulo - Li estu benata! La juda batalorganizo decidis ekagi morgaŭ. Laŭ peto de Mordeĥaj, mi presis propagandilon kiu estos disdonata ĉi-nokte en la getto (...) Mi presis centon mane. Ni preskaŭ ne plu havas inkon nek paperon (...)

18-an de januaro. La jaron 5703-an post la kreado de l'mondo fare de la Eternulo - Li estu benata! Hersch venis viziti min por scii ĉu mi bezonas ion, Dio benu lin! Mordeĥaj kaj liaj kamaradoj nun troviĝas ĉe n-ro 58 de Zamenhofstrato. Ili estas pretaj. Hersch diris al mi ke la Germanoj malplenigis la hospitalon. Ili mortpafis la malsanulojn (...)

Pafoj, krioj, eksplodo. Ho Sinjoro!

Abrahamo eliris el la kelo kun la espero vidi siajn turmentistojn disfali. Li ŝanceliĝis pro malforteco. Antaŭ ol iri en straton li volis supreniri al sia loĝejo (...) Bruo de botoj kaj voĉoj plenigis la ŝtuparejon. Abrahamo retropaŝis al la fenestro-pordo (...)

- Manojn supren! Voĉo kriis germane. Maltenu ciajn pakajojn!

Abrahamo ankoraŭ retropaŝis. Li estis sur la balkono. Malsupre, ĉe la piedo de la domo, tanko posteniĝis.

- Jude! Hände hoch! Manojn supren!

Abrahamo turniĝis por malstifi la grenadon, kiel Mordeĥaj lernigis al li. Poste li diris:

- Šma Israel, aŭskultu, Israel...

Li ne rekonis sian propran voĉon. Kaj li ĵetis sin sur la tankon.

Tiel mortis Abrahamo Halter, mia avo, presisto en Varsovio (...)

\* Ni tradukis ĝin kun la afabla permeso de la kuzino de la aŭtoro en lia nomo. El "La mémoire d'Abraham", Paris: eld. Laffont, 1983, p.656-704. Tio celas illustri la biografian artikolon de H.D. Maas (en n-ro 15, p.20-21), kaj aldoniĝas al la "dokumenta dramo" pri Lidja "Ni vivos!" de J. Modest (HEA, 1983; vidu recenzon en Esperanto n-ro 940, apr.84, p.71), kaj al artikolo de Zofia Banet-Fornalowa, "Religia vivo en varsovia getto", en *Monato*, julio 1994, p.29.

Notoj: 1/ Paska manĝo. 2/ Rakonto pri la eliro el Egiptio legata dum Seder. 3/ Jida vorto tiela en la teksto. 4/ = 1942.

## Majaa legendo pri la kreado

Kiam la tempo ne havis eraon, Tepen kaj Gugumatz malmergiĝis el la ĉieloj, kiel kreantoj, elfarantoj. Kun tre granda reciproka fido kiu naskiĝis dum iliaj diversaj renkontoj ili faris grandan decidon: peti Hunab K'u-n ke li kreu la homon kaj ĉiun vivformon sur la Patrino Tero.

Hunab K'u respondis: "De mia domo en la ĉieloj mi planis ĉiun kreaĵon sur la Tero. Vi estos la elfarantoj, la gardantoj de kion mi konceptis". Hunab K'u konstruis sian domon piramidforme kaj, ĉe ties plej alta punkto, li metis Hujubkaan-n dirante al li: "Ci donos la spiron por ke ĉio povu ekvivi". Tiamaniere ĉio estis instalata en la domo de Dio en la ĉieloj. Hunab K'u metis la konstelacion de Oriono ĉe la centro de sia piramida domo en la ĉieloj, por ke ĝi povu esti la lumturo de la lumego kaj de la brilego. Ĝi estis iluminata per multaj koloroj kiuj harmoniis kun la ĉiela muziko de la ĉieloj. Hunab K'u decidis ke la homo povos, por ĉiam, spirite eniri en tiun sanktan templon.

Ĉio estis farata de Hunab K'u en sep mezuroj da tempo. Li diris al Tepen kaj Gugumatz: "Ĉiam restu kune. Ci, Hujubkaan, ci vivos ĉe la plej alta punkto de mia piramido en la kompanio de Tepen kaj Gugumatz. Ĉiu el vi estos stelo." Hunab K'u pluparolis: "Zorgu pri la lumo kiun mi lasas ene de mia templo. Kiam vi elfaros la homon, instruu al li respekteme mian domon ĉar li tie trovos la lumon kiun li bezonas por la eterna vivo. Ankaŭ instruu al li ke se li devojiĝos pro siaj eraroj, siaj malvirtoj aŭ sia nescio, tiam mi, Hunab K'u, mi revokos miajn amatojn kaj mi akceptos ilin en mian templon de saĝo por spirite nutri ilin kaj ilin denove lumigi per mia lumo kiu estas en la ĉieloj. Poste, kune, kun Tepen, Gugumatz kaj Hujubkaan, ni uzos la brilon de tiu lumo dum la ritoj de purigo por la profito de miaj amatoj, kreitaj kaj elfaritaj tiel ke ili povu vivi en la lumo de la eterna saĝo."

Tio ĉi estis farata de la kreintoj, la elfarintoj, antaŭ la komenco de la tempoj. Tial, la Majaa popolo restis atentema, observante la ĉielojn dum miloj da jaroj por kompreni la grandan leĝon de Hunab K'u.

Honore kaj respekteme al li, miloj da piramidoj estis konstruataj (...) Laŭdire dum renkontiĝo, en 1475 en Wenk'Al, de la supera konsilio de la Majaa pastroj, estis rivelaciata ke dum la tempo de du cikloj de la kalendaro K'Altun, la Majaa kulturo dronos en obskuro (...) En 1995 do la dua ciklo de la kalendaro K'Altun estas finiĝanta.

Inica pilgrimado en la Majaa lando okazas de la 19-a ĝis 31-a de marto 1995, iniciatite de la Majaa spirita ĉefo Hunbatz Men, al Chichen Itza, Uxmal, Palenque. (La 24-an de marto "la Majaa Supera Konsilio eldiros la Mesaĝon konservitan dum 500 jaroj!")

(Neniu indiko de la fonto nek de la lingvo en kiu la teksto estas origine skribita. La nura mencio pri ĝi estas: "Tiu ĉi estas elirita de sankta manuskripto".)



# Falo de la homaro kaj kreado de la ĉi-mondo

laŭ la "Moderna Rozokruco"

Ĉu nur unu Dio ?

Iam en la tempo, antaŭ miloj da milionoj da jarcentoj, la homaro estis en Dio kaj estis Dio. Ĉia homa estaĵo posedis ĉiajn diajn povojn, ĝuis la tutan amon de Dio kaj samdividis ĝin kun siaj kunfratoj. En la sino de Dio ĉiu homa estaĵo estis absolute senlime libera kaj kapablis krei neimageblajn belaĵojn kaj harmoniojn por kaŭzi nepriskribeblajn feliĉojn kaj ĝojon. Tio estis la paradizo.

Sed venis la tempo kiam parto de la homaro, anstataŭ esti en Dio, volis esti kiel Dio, kaj trozante sian liberecon, altiri al si mem la tutan amon kaj povon de Dio, anstataŭ kundividi ilin kun siaj kunfratoj ; ĉiu fariĝis (ego)centripeta anstataŭ resti (ego)centrifuga kiel antaŭe ; ekestis memcentrismo, memismo, egoismo. La leĝo ne plu estis "ĉio por ĉiuj", sed "ĉio por mi !".

Tia egocentripeta, egocentrisma, egoisma sinteno konsistigas la tiel nomatan originan pekon por tiu parto de la homaro inter kiu malfeliĉe troviĝas ni mem ; kaj kiam estas dirite "ni mem", tio signifas ĉiajn homajn estaĵojn loĝantajn en ĉiuj planedoj de ĉiuj sunsistemoj en ĉiuj galaksioj<sup>1</sup>.

Kun la ekesto de la egoismo, tiu ĉi parto de la homaro malaltigis sian vibrokapablon, densiĝis, plipeziĝis ; kaj ĉar "ĉiu pezaĵo falas pro sia propra pezo", tiu ĉi parto de la homaro falis en pli densan vibrokampon aŭ "kosman planon", kiel diras la esoteristoj. Per sia falo tiu ĉi parto de la homaro perdis sian unuan paradizon : malproksimiĝis de Dio.

Tian unuan paradizon aludas Jesuo kiam li diras la konatan frazon "mia regno ne estas ĉi-monda". Al tia ne-ĉi-monda regno, al la patra hejmo, ni nepre devas reveni tra neimageble longdaŭra pilgrimado.

## Apero de la dialektika mondo

Ĝuste por nin helpi dum tiu pilgrimado al la Patra Hejmo, la Logos de la kosmo, la nefalinta parto de la homaro, kaj la Elohimoj<sup>2</sup> de la judokristana teologio - konataj per aliaj nomoj en aliaj kulturoj - , kreis la dialektikan, duecan, dupolusan mondon, kiun regas la "paroj de maloj" (tago/nokto, varmo/malvarmo, enspiro/elspiro, sistolo/diastolo, amo/malamo, dormo/vekiteco, ktp). Tiaj paroj de maloj sin generas kaj postsekvas unu la alian en sinsekva eterna ritmo.

Ni ripetu : la ĉefa karaktero de la dialektika mondo estas dueco, poluseco, kaj ĝuste pro tio la Moderna Rozokruco nomas ĝin dialektika.

Ni ĵus diris ke la Elohimoj kreis la dialektikan mondon. Tiu kreado okazis dum ses tempoperiodoj neimageble daŭraj. En Genezo, la unua libro de la Biblio kiun multaj certe legis en sia infaneco, tiajn tempoperiodojn oni nomas "tagoj" : ses tagoj dum kiuj Dio laboris por ripozi dum la sepa tago. Ĉiuj memoras la famajn vortojn : "kaj Dio diris : estu la lumo, kaj la lumo ekestis"<sup>3</sup>.

Sed oni nun ne povas eviti la demandon : ĉu Dio aŭ Dioj ? Ĉar monoteismo<sup>4</sup> kaj politeismo<sup>5</sup> perfekte kunekzistas kaj ĉiam kunekzistis, kiom ajn stranga kaj hereza tio ĉi povos ŝajni al kelkaj mensoj. Ĉiuj kulturoj ĉiam parolis pri Dioj, kaj en la dua libro de la Biblio, Eliro, Jehovah plurfoje admonas la israelidojn "ne adori la Diojn de aliaj popoloj" aŭ "ne adori alian Dion krom Mi". Per tiuj vortoj Jehovah konfesas ke li ne estas Dio, sed unu el la Dioj, kaj tia vere estas la fakto laŭ la universala esotera tradicio<sup>6</sup>. Nur ne-esotera kristanismo forte emfazas la dogmon pri unusola Dio<sup>7</sup>.

Kiam mi studis Genezon en mia infaneco, mi - kiel supozeble ankaŭ multaj el la legantoj - trovis la jenon paradoksa : "Kaj Dio diris : ni faru la homon laŭ nia bildo kaj similo"<sup>8</sup>. Kial Li, la Unusola, uzas la pluralojn "ni" kaj "nia" ? La teksto devus esti : "Kaj la Elohimoj diris..." Sed la kristanoj insiste volis ke la kreinto de la dialektika, dueca kaj ŝanĝigema mondo estu la unusola Dio, ne Liaj kunlaborantoj la Elohimoj.

Por fini tiun aspekton de la krea procezo, ni nur diru ke la rakonto de Genezo aludas la aperon de nia sunsistemo. La najbaraj sunsistemoj de nia galaksio aŭ la pli malproksimaj en aliaj galaksioj tute ne koncernas nin. Kiam ni preĝas dirante "Patro NIA, estanta en la ĉielo", ni preĝas al la Patro (Logos) de nia sunsistemo. La aliaj tute ne gravas por ni.

(Sekvote ?)

Jozefo Gomez Ibars\*

\* 74-jara denaska blindulo, emeritulo post 41 jaroj da laboro en brajlo-presejo. Esperantisto de antaŭ multaj jaroj kiu samtempe interesiĝas pri spiritaĵoj, pri spiritaĵoj grupoj, movadoj, instruoj, ktp. Post multaj spertoj dum sia vivo, nun estas disĉiplo de la Spirita Skolo de la Ora Rozokruco, fondita en Nederlando en 1924.

Ŝatus korespondi pere de parolataj leteroj, surbendigitaj sur kasedo. Jen lia adreso : Strato Manso n°70 principal 2°, E-08015 Barcelona (Katalunio).

Notoj de la redaktoro :

1/ Eble utilas ĉi tie precizigi denove (kiel jam sur la 2-a pago de Asistilo n-ro 8), ke pri la opinioj kaj enhavo de la artikoloj respondecas neniel ASISTI aŭ la redaktoro de Asistilo, sed nur la aŭtoroj mem.

2/ Ni respektas la uzadon de la aŭtoro pri tiu ĉi vorto kvankam Elohim jam estas pluralo.

3/ Laŭ Zamenhoftrad.: "Estu lumo ; kaj fariĝis lumo".

4/ Tio estas diunuismo.

5/ Tio estas dimultismo.

6/ Tiu ĉi aserto tamen levas alian demandon, pli ti-klan : ĉu tia universala esotera tradicio vere ekzistas ?

7/ Ŝajnas tamen ke almenaŭ judismo kaj islamo ankaŭ asertas, eĉ pli firme, la samon.

8/ Laŭ trad. de Zamenhof, judo do ne kristano : "Kaj Dio diris : Ni kreu homon laŭ Nia bildo, similan al Ni". (Gn 1,26)

# Atentokaptaj notoj kaj nova versio

Antaŭ jam pli ol unu jaro mi ricevis 4 libretojn (de 63- ĝis 91-pagaj) de la kolekto *Fonto-kajeroj* (n-roj 6,7,8 kaj 9, eldonitaj en Chapeco, Brazilo); sed longe mi ne sentis min kapabla recenzi ilin ĉar mi estas nek tre diligenta helenisto (male de la aŭtoro, Gerrit Berveling!), nek tre klera esperantologo; kaj fakulo pri aliaj religioj pli ol pri kristanismo.

Sed, sufiĉe surprize por mi, tiu nova traduko de konataj tekstoj montriĝis tute malenuiga kaj forte vekis mian scivolemon. Jen do kelkaj rezultoj de mia kritiko<sup>1</sup>. Sed tiuj kritikoj<sup>2</sup> ne celas deturni legantojn de tiuj nemalhaveblaj kajeroj, tute male eksciti ilian apetiton; nek subfosi la realan valoron de la traduko, nur provi "devigi" la aŭtoron plu verki: laŭ mia scio ankoraŭ ne ekzistas originala esperantlingva komentario pri la evangelioj, kaj certe ne laŭ lia interesege vidpunkto.

Do se "ne estas nun tie ĉi la loko plidetaligi" (n-ro 6 p.11), certe indus aliloke! Mi esperas do ke li iam akceptos "konfrontiĝi" kun la jenaj rimarkoj por pli detale pravigi sin pri la jenaj - ekzemplaj - punktoj.

## I - Pri la notoj kaj komentarioj

### Tre personaj hipotezoj

En la enkonduko de la unua kajero (n-ro 6, p.13), la aŭtoro skribas: "La tuta evangelio laŭ Marko estas nur 'Komenco de la bona mesaĝo de Jesuo Mesio'; ĉar tiu unua frazo, miasupoze, fakte estas la titolo de la tuta verketo."

Tio ne estas la opinio de la fama dominikana ekzegezisto P-ro Lagrange, fondinto de la "Biblia Lernejo en Jerusalemo" kaj de la unua scienca ekzegeza skolo ĉe la katolikoj. Laŭ li la vorto 'komenco' (archè) signifas ke "la evangelio, tiu kiun oni predikis pri la persono Jesuo-Kristo, Filo de Dio, komenciĝis per la predikado de Johano [la Baptisto]."<sup>3</sup>

### Neklarigitaj elektoj

"Ie tie kvazaŭ 'mankas' detaloj (...) kiel ĉi-loke [Mt 1,1] la aldono 'Filo de Dio', sed se ekzistas serioza kialo por pridubi la aŭtentecon de tia tekstero, kiel fakte ĉi tie, mi ne hezitis sekvi la t.n. kritikan eldonon de Nestle."

La nun klasika eldono de Nestle, kiu donas la grekan originalon kun ĉiuj variantoj laŭ la diversaj manuskriptoj, certe estas la plej bona bazo de nova traduko; sed en la citita kazo la katolika pastro M.-E. Boismard, Profesoro ĉe la "Biblia Lernejo en Jerusalemo", havas kontraŭan opinion, precizigante ke "la esprimo 'Filo de Dio' estas konservenda, malgraŭ la silento de [t.e. ĝia manko en] kelkaj manuskriptoj." (samloke)

Oni do vidas ke diversaj fakistoj havas malsamajn opiniojn. Sed ni ne eniros la debaton, ĉar nek la unua nek la alia donas siajn argumentojn pri tiu ĉi punkto. Tio nur montras ke ĉiam intere-

se estas povi kompari komentariojn de diversaj aŭtoroj por havi la eblecon ne tuj esti senrezerve imponata de opinio pro la fakuleco de ties aŭtoro.

Tial la sennota eldono de la Brita kaj alilanda Biblia Societo (kiun ni poste nomos nur la londona traduko) ne plu sufiĉas kaj ni do senpacience atendas la ekumenan tradukon de la Biblio kun notoj, delonge iniciatitan de P-o Anĝelo Duranti (kiu daŭre serĉas kunlaborantojn por traduki malnovtestamentajn tekstojn el la hebrea).

### Tro rapidaj konkludoj

Ŝajnas ke Gerrit Berveling estas pli helenisto ol hebreaisto kiam li skribas en noto pri Mk 3,31: "Jesuo do havis fratojn kaj fratinojn - malgraŭ pliposta tradicio pri 'eterna virgeco' de lia patrino Maria".

Ekzistas tute alia interpreto. Se Luko "forigas la mencion de la fratoj kaj fratinoj de Jesuo", li faras tion, laŭ Boismard, ĉar tio "povis esti interpretata de grekaj legantoj en la propra senco de 'fratoj' kaj 'fratinoj', kaj ne en la senco de 'kuzoj', ebla en semida lingvo (vidu Mt 27,56)." Kaj se oni legas la paralelajn tekstojn de tiu ĉi referenco, oni vidas ke Jakobo kaj Josef (aŭ Joset) estas preskaŭ certe filoj de Maria, edzino de Klopas kaj fratino de Maria patrino de Jesuo (vidu ankaŭ Mk 15,40 kaj Jh 19,25).

Alia ekzemplo en noto pri Mk 6,3: "La ĉarpentisto, do li laboris en tiu profesio. (Pli poste, 'Mateo' ŝanĝis tion ĉi al 'ĉu li ne estas la filo de ĉarpentisto', kvazaŭ tia profesio ne decus por Mesio)." La interpreto de Boismard estas kontraŭa:

"La lasta mark-luka redaktanto enŝovis en la mez-Mk la novajn disvolvadojn de Mt 13,55-58 (...) ĉe la versiklo [6.] 3a, la lasta mark-luka redaktanto anstataŭigas la esprimon 'la filo de la ĉarpentisto' (vidu Lk/Jh) per 'la ĉarpentisto, la filo de...'. Tiu formulo, certe dua, estas en harmonio kun Lk 1,34-35 atestanta la virgan koncipadon."

Ĉi tie Gerrit Berveling, katenita de sia koncepto pri la sinsekvo de la evangelioj, maltrafis do okazon aserti ke Jesuo estis filo de Jozef!

### Tro fortaj asertoj

Ankaŭ pri la datoj kaj influoj inter la tri evangelioj laŭ Marko, Mateo kaj Luko mi ne tute konsentas kun la aŭtoro kiam li skribas: "La fakuloj intertempe atingis preskaŭ unuaniman konsenton ke la t.n. Evangelio laŭ Marko estas la unue verkita tiaspeca verkaŝo: per tiu ĉi nova 'ĝenro' la nekonata aŭtoro ('Marko') interligas plurajn dirojn de Jesuo kun agoj de Jesuo (ankaŭ liatempe jam tradiciaj en la estiĝanta kristanismo)."

Ŝajnas, ekzemple, ke Prof. Boismard, tra tro komplika skemo por ke mi priskribu ĝin en kelkaj linioj, pensas ke "la plej primitiva formo de la evangelio de Marko" povas esti identa kun kion li mem nomas "Dokumento B", kiu estas ĝia "ĉefa

# de la bonaj mesagoj de Jesuo

fonto" kaj en kiu ĝi "havas siajn ĉefajn radikojn"; kaj ke tiu Dokumento B' estas mem reinterpretado pli malpli larĝa, por la uzo de la "pagankristanaj" eklezioj", de iu Dokumento A' "palestinorigina, naskiĝinta en judkristanaj medioj"; kaj laŭ li la tri fundamentaj dokumentoj "jam estis evangelioj, ĉiu estanta homogena tuto".<sup>7</sup> Do la vere unua evangelio estus la Dokumento A, kiu estas la ĉefa fonto de la matea evangelia tradicio.

Oni devas do atentigi ke la "teorio de la du fontoj" kiun versajne aludas G. Berveling kaj kiu komence de la 1980-aj jaroj estis "ankoraŭ rigardata kiel nediskutebla 'dogmo' de multaj komentariistoj, ĉefe en Germanio", nun estas objekto "de akraj atakoj venantaj de diversaj direktoj" laŭ Boismard kiu proponas novan, multe pli kompleksan teorion en 3 pagoj ...plus 42 da pravigo!

## II - Pri la traduko

Pri la traduko mi ne kompetentas por vere juĝi ĝin, des pli ke mi nuntempe ne havas kun mi la grekajn originalojn por kompari frazon post frazo. Sed eble, ekzemple, la traduko "Kaj li gestadis ŝt' kaj tuj lin forsendis" (Mk 1,43) estas iometro milda. Ĉi-kaze la "Kaj severe avertinte lin..." de la londona traduko, estas pli proksima.

Mi do povas nur taksii la esperantan tekston en ĝi mem. Mi ŝatis ĝin, kvankam estas, laŭ mi, tro da neologismoj. Sed oni plezure legas ĝin - eĉ se mi ne ŝatas formojn kiel "skribitas" (Mk 1,2) -, ĉar ĝi estas multe pli glata ol la londona traduko.

### Ekz. de neologismoj kaj eraroj

bestioj (Mk 1,13), anstataŭ: sovaĝaj bestoj  
gestikulis (Lk 1,22), anstataŭ: faradis signojn  
montrigis graveda el sankta spirito anstataŭ:  
trovigis graveda per... (Mt 1,18). Komparu kun:  
gravedigis de sia patro (Gn 19,36).  
lomo<sup>8</sup> (n. Mk 2,4) anstataŭ ?  
Kapitolina (6 p.11) kial ne Kapitola (PIVa)  
variacio<sup>9</sup> (n. Mt 1,16), anstataŭ varianto

### Ĉu katarismema traduko ?

Tiu ĉi titolo estas nur ŝerca, kompreneble ! Sed por montri la gravecon de la tradukaj problemoj alfrontendaj mi elektos nur du versiklojn.<sup>10</sup> El la Johana prologo (Jh 1, 3 kaj 4).

Ni komparu la tradukon de la londona Biblio : "3 (Ĉio estiĝis per li ;) kaj aparte de li estiĝis nenio, kio estiĝis. 4 En li estis la vivo kaj la vivo estis la lumo de la homoj.", kun la traduko de Gerrit Berveling : " 3 (Ĉio estiĝis pere de ĝi,) kaj sen ĝi nenio estiĝis. Kio estiĝis 4 vivis en ĝi, kaj la vivo estis la lumo de la homoj."

La unua traduko estas probable influita de la Vulgato<sup>11</sup>. La 2-a estas pli proksima al "la malnova langvedoka" (latina traduko pli malnova ol la Vulgato).

Oni eĉ povus proponi almenaŭ same prave : " (...) kaj sen ĝi (aŭ aparte de ĝi) estiĝis (la) nenio. Kio estiĝis en li estis (la) vivo (...)" . Temas pri la okcitana traduko farita de katar(ist)oj (en la 2-a duono de la XIII-a jc.) : "e senes lui es fait nient (...)" . Kaj tiuj ĉi versikloj estis uzataj de ili kiel bazo por ilia dualismo : se la nenio fariĝis sen li (kiu estas ekde la komenco), do estas alia fonto por ĝi : la Malbonulo, tute aparta de Dio.<sup>12</sup>

## Konkludo

Oni vidas ke neniu traduko povas esti neŭtrala ĉar temas samtempe pri neevitebla interpreto de la penso de la aŭtoro. Ĉiu teksto estas virtuale pli malpli plursenca, kaj tradukantoj devas fari elektojn inter tiuj eblecoj. Se "ĉiu evangelio spegulas difinitan teologian sintenon aŭ etoson" kiel la tradukanto mem rimarkigis (en n-ro 6, p.6), oni povas same diri (tamen laŭ malpli granda grado kompreneble !) pri ĝiaj tradukoj.

Gerrit Berveling do DEVIS fari la siajn, pri kiuj mi nur ne ĉiam konsentas, sed ni neniam povos scii kiu pravas. Ne gravas : tiu ĉi traduko, alportante novan version de konata teksto, povas renovigi nian rigardon al la evangelioj, kaj do al Jesuo mem !

Tial ĝi certe estas tute nemalhavebla, kaj por ĉiu veroserĉanto, kaj por ĉiu ano de nia postkristana civilizacio ĉar tiuj tekstoj estis la ĉefa fundamento de nia preskaŭ 2000-jara kulturo.

Oni nur restu sufiĉe singarda pri la nepruvita enhavo ("car kutime ekstraj notoj pri tekstokritikaj aferoj estus tro fakulaj mi en tio min limigis"<sup>13</sup> bedaŭrinde !) de kelkaj notoj, kiuj almenaŭ ekscitas la atenton kaj devigas al interesa pripensado !

Christian Lavarenne\*

### Notoj

- 1/ Pli laŭ la 2-a PIV-a senco ol la 1-a.
- 2/ Senco 3 de PIV !
- 3/ Citita en "Synopse des 4 Evangiles", de P. Benoit kaj M.-E. Boismard, Parizo : Cerf, t.II, 2-a eld., 1980, p.69b.
- 4/ N-ro 6, p.11.
- 5/ Pagano ĉi tie signifas nejudo.
- 6/ Ĉar ekzistas ankoraŭ iu "C", plie de la tradicia "Q" kiun mencias G. Berveling en n-ro 7, p.5 !
- 7/ Samloke, p.15b-16a.
- 8/ Sed ĝi tamen estas en la Suplemento de PIV.
- 9/ Ĉi-kaze temas ne pri neologismo sed pri eraro.
- 10/ Tiu ĉi neologismon, jam en la Suplemento de PIV kun alia senco, mi volonte akceptas por signifi parteton de biblia teksto ĉar temas nek pri versoj nek pri versetoj, sed pri io tute alia pri kiu ankoraŭ ne ekzistas vorto en esperanto
- 11/ La latina traduko de Hieronimo el la IV-a jc., oficiala teksto dum pli ol 1000 jaroj.
- 12/ Vidu Anne Breton, "Le vrai visage du catharisme" (La vera vizaĝo de katarismo), Portet-sur-Garonne : eld. Louba-tières, (1991, nova, reviziita eld.), p. 60.
- 13/ N-ro 6, p.55.

\* Tiu ĉi recenzo, petita de Istvan Ertl, estis unue destinita al la revuo *Esperanto* ; sed sendita en majo 1994 ĝi restis ĝis nun nepublikigita.

# Taoismo en Kolombio

Antaŭ kvin jaroj, duafoje mi travojaĝis Latin-amerikon. Post ŝipa supreniro de Amazonio el la atlantika marbordo ĝis la unuaj montetoj de la anda kordilero, kaj laciga kvintaga traŭro de tiu ĉi lasta montoĉeno dum la pluvsezono, mi atingis Kition, la ĉefurbon de Ekvadoro. Kun ĝojo mi ĝuis ripozan retrovon de la plej trankvila ĉefurbo de Sudameriko.

Okaze de promenado, mi stumblis pro eta piramido kiu staris sur la trotuaro. Ĉar ASISTI-legantoj estas ĉefe religiemuloj, mi estas certa ke vi ne kredas je hazardo. Oni diras: "*Ne moviĝas arbofolio sen la volo de Dio*", ĉu ne?

Hodiaŭ mi ne dubas ke jaroj da vojaĝo, centmiloj da kilometroj tra la mondo kaj tra legado de centoj da libroj por kompreni nian mondon kaj min mem, nur celis tiun kolizion.

## Unua kontakto

La piramido anoncis posttagmezan prelegon pri eksterteranoj (...) Post prelego antaŭ deketo da aŭskultantoj, kiu, pro la publikkvanto, memorigis al mi prelegojn miajn en Esperanto, mi fariĝis la ĉefa intereso pro mia alilandeco. Komprenoble mi profitis la okazon por propagandi pri Esperanto, kaj konsentis tagmanĝi kun la preleginto. Dum la prelego li ĉefe parolis pri la strukturo de la kosmo laŭ konoj eksterteraj. Okaze de nia komuna satigo li iom pli detale precizigis al mi la enhavon de la movado al kiu li apartenis.

La majstro-profeto estas el Kolombio kaj li emfazis ĉefe la vegetarismon kaj la neperdon de la gena (t.e. seksa) energio. Tio kaptis mian atenton ĉar mi jam estis praktikanta vegetaran dieton kaj iam interesigis pri tantrismo okaze de vojaĝo en Bharato.

Kvankam mi intencis rapide iri al la landlimo inter Kolombio kaj Panamo por piede transpasi tiun sovaĝan regionon antaŭ la pluvsezono, mi sentis nerezisteblan emon devojiĝi kaj viziti tiun strangan majstron. Mi ne detalos la cirkonstancojn de nia renkontiĝo sed vi komprenos ke ĉio ŝajnis al mi ankoraŭ pli stranga kiam mi eksciis la nomon de lia komunumo: "*Tao-Eklezio Krista Universala*".

Kio ligas Kriston kun la Tao? Ekde kiam la Tao enradikiĝis en Sudameriko?

## La majstro

Fakte la majstro estas kamparano kiu neniam eliris el Kolombio! Mi do estis ege surprizata kiam li per nehoma flueco de la parolkapablo prelegis per telefone dum horoj pri ĉiaj temoj liverante al diversaj lokoj de Sudameriko sciojn ofte nekonatajn de sia disĉiploj. Tiuj ĉi estis ne nur kamparanoj sed ankaŭ kuracistoj, advokatoj, inĝenieroj, majstroj pri martaj\* luktoartoj...

La ĉefa trajto de liaj instruoj estas la praktiko okaze de la ĉiutaga vivo. Ne estas antaŭprogramitaj prelegoj, ne, ĉio okazas kvazaŭ hazarde kiam sekvas lia per netaŭga ago, vorto, aŭ eĉ penso, jen dum labortempo, jen dum komuna kunvivo, jen dum neago\*\*, okazigas elsprucon de lia saĝeco. Tiam la tempo ne plu ekzistas.

Kvankam la laboro estas ĉiam intensa, nenio estas pli grava ol la evoluo de la animoj kiuj ĉirkaŭas lin.

La ĉefa misto de ĉiu el ni estas savo de sia animo. Per strebo al perfekteco aga, vorta kaj pensa, ni povas atingi spiritaĵajn nivelojn kiuj ebligas nin reenkarigi en alian sferon\*\*\* kaj tiel liberiĝi de la sfero Tero. Mi diras liberiĝi ĉar vere nia sfero estas karcero de la kosmo. Tion atestas la nuna stato de la homaro. Sufiĉas konscii pri la milionoj da mortintoj pro malsato, malsano, milito kaj la milionoj da suferantoj pro la samaj kialoj kaj pro mallibereco, malriĉeco, seksa perforto, rasismo... por ne dubi ke ni loĝas en infera karcero. Tion la Kristo mem konfirmis dirante: "*Vi estas de patro, la diablo, kaj vi volas fari la dezirojn de via patro*" (Jhn 8,44).

Sed celi al tiu liberiĝo ne stimulas egoistan klopodon al memevoluo ĉar tiun ĉi lastan oni ne akiras sen sinofero por plibonigo de la homaro.

## Kial?

La ĉefa kialo de la nuna stato de la homaro estas la apartiĝo far la homoj el la diaj leĝoj aŭ leĝoj de la naturo. La homa speco degeneris pro transpaso de tiuj ĉi leĝoj kaj perdis la kapablecojn kiujn ĝi havis, fariĝanta subhoma, korpe kaj mense. La plimulto el la loĝantoj de la Tero havas atrofiitajn muskolojn kaj cerbon, korpan kaj mensan malsanojn. Tion ĉi kaŭzis la modernaj vivkondicoj kiuj krome detruas la naturon. La homo ne plu kapablas elekti la taŭgajn nutraĵojn kiujn lia korpo bezonas, li forgesis ke li spiradas, li ne dormas konforme al la natura ciklo de la lumo, li ne plu havas rektajn kontaktojn kun la vivaj akvoj, tero kaj aero. La vivaj energioj de la naturo ne plu cirkulas en li. Krome li sence dissemas sian seksan energion.

Konsekvence liaj pensoj, paroloj kaj agoj fariĝis pli kaj pli kontraŭnaturaj.

(Sekvote)

*Werphalus*  
(= Philippe Chavignon)

## Notoj de la aŭtoro

\* Martaj ĉar ili vere estis liveritaj al nia sfero el Marto.

\*\* Vidu artikolon en *Asistilo* n-ro 14 p.7

\*\*\* La majstro ne uzas la vorton "planedo" (en la hispana: planeta, devenanta de la radiko plan = eben-) kiu pravigas katolikan obskurantismon (Memoru Galilejon, 1564-1642)

# Leteroj de legantoj

## De la (perletere konfirmita)

Mi ne povis partopreni la UK en Seulo, kio estas granda tristaĵo al mi ĉar mi deziregis esti kun miaj koreaj geamikoj en ilia momento de gloro, kaj viziti mian malnovan hejmon en Tajvano.

Mi tamen havis interesajn feriojn en Prago, kie mi partoprenis 8-tagan latinan seminarion, dum kiu mi havis la unuan ŝancon en mia vivo uzi la latinan en longa konversaciado.

En somero de 1995 mi planas ĉeesti la UK-on en Tempere, kaj, Paske, la Interreligian Seminarion de ASISTI, en kies estraro mi nun sidas.

La Universala Tao-Stud-Ligo Esperantista kies prezidanto mi estas, iom post iom kreskas kaj nun havas membrojn en 6 landoj kaj abonantojn kaj korespondantojn en aliaj 3. Mi pardonpetas ke la tria numero de "Tao" ankoraŭ ne aperis; mi simple estis supersŭtita ĉar unue nia lingva instituto Unumondo ĉi tie en Kedzierzyn-Kozle (PL) spertis grandan sukceson ĉi-jare, kaj (...) subite mi devis preni iom da gvidaj devoj de nia loka klubo kaj ankoraŭ la instruadon de nia esperanta kurso. Tamen mi esperas ke ĝi aperos en la unua monato de la ĉina nov-jaro, kiu komenciĝis la 31-an de januaro, kaj estas la 4692-a jaro de la eksurtroniĝo de la Flava Imperiestro (Huang Ti), kaj cetere Jaro de la Porko, kaj laŭ sesdekjara ciklo "I-hai".

(...) Mi deziras por vi kaj via familio sanon, pacon kaj sukceson en la nova jaro.

Samideane via en la Vojo, *Bradío Moro* (PL)

## Pri kredo je diablo

Kolombo, 27-8-1994

(...) Ekzistas ekumenika instituto por la studo kaj dialogo en Sri Lankao (adreso: 490/5 Havelock Road, Colombo 6, Sri Lanka). Se iu volas korespondi kun ĝi mi pretas traduki al la angla se necese.

Ĉu juda leganto bonvolos klarigi tion al mi? En "Hinduism Today" Bernard Konowitz skribis: "Judoj ne kredas je diablo nek eterna damno nek Javeo. Mi devus scii ĉar antaŭ akcepti Ŝivaismo mi naskiĝis kaj edukiĝis kiel tradicia judo." (...)

Ronald C. Peries (Sri Lanko)

## Pri la temo de la ISE

Balagué, 11-12-1994

Mi estis tre kontenta kiam plej multaj partoprenantoj de la ISE interkonsentis pri la temo *Lingvo: barilo kaj ŝlosilo por interreligia dialogo*, ĉar ĉi-temo estas laŭ mi tre konkreta kaj traktebla. Poste mi malkontente vidis ke iel leviĝis ŝajnkonkurencaj proponoj kiel "Vero estas tio kio simpligas, ne tio kio estigas kaoson", kaj lasta-tempe: "Frata kunvivado"; ambaŭ, laŭ mi, ne estas tre konkrete trakteblaj; ili estas elektitaj por en la unua kazo produkti reklamon por bahaismo kaj en la dua kazo por produkti multajn belajn netreutilajn vortojn pri la neceseco harmonie kunvivi.

Do mi voĉdonus por la interkonsentita!

Bonvolu legi ankoraŭ sur p.12! Mike Sadler (Britio)

## ASISTI - kasisto Bradío V. Moro

(Kaj jen parta traduko de lia letero en la latina, sub la titolo: ) *Nuntia ex Silesia a. MCMXCIV*<sup>o</sup>

Annus ad finem venit, et adventus feriarum mensem ad illos, cuius in reliquo anni non satis sine dubio meminimus, vertit. Ecce ergo nuntia mea:

(...) Non poteram Universali Congressui Esperantico Seuli in Corea interesse, quod mihi res molestissima erat, nam valde volebam cum amicis Coreanis meis ad tempus magnae eius gloriae esse, et insuper Formosam revisare.

Tamen potui ferias aestivas iocundas habere, nam seminario Latino Pragae interfui, ubi VIII dies Latine locutus sum. Erat prima occasio in vita mea, ut Latine diu colloqui possem.

Aestate anni MCMXCV in animo habeo in Universali Congressu Esperantico in urbe Tempere in Finnia esse, et feriis paschalibus Budapestini, ut Seminario Interreligioso "Associationis Internationalis ad Studium Doctrinarum Spiritualium Theologicarumque" (=ASISTI!) in cuius collegio rectorum nunc sideo.

"Universale Taoisticorum Studiorum Collegium Esperantistarum", cuius preses sum, gradatim crescit, et nunc sodales in VI nationibus habet et adnotatores\* amicosque in III aliis.

(...) Opto vobis et familiis vestris valitudinem, pacem resque secundas ad annum. (...) Semper valete!

\* Quid scripisti?! (Nota de la red.)

## Pri "Homo-Centro"

Milano, januaro 1995

*Homo-Centro* estas prispirita centro en Lucca, kiu akceptas veroserĉantojn kiuj alvenas de pluraj lokoj en la mondo (...) Ĝi agas kiel ekumena poluso en kiu oni plenumas la komparan pristudadon de la religioj; oni organizas interreligiajn renkontojn, kaj oni praktikadas iun meditadon (aŭ kontempladon) de universala karaktero.

Mi deziras memorigi ke Rozalia Zamenhof edukadis sian filon Ludoviko laŭ la instruo ke "ĉiuj homoj estas filoj de unu Dio amanta" (Boulton); kaj ke Zamenhof mem aspiris ĉefe amon, veron, pacon kaj fratecon inter la homoj (...)

Nu, la idealoj kiuj inspiris la revon de Zamenhof ("homaranismo") kaj la profunde religia tendenco tra kiu ekestis kaj al kiu precipe celis nia amata lingvo (...) realiĝas tiamaniere (...)

Enrico Marzola (Italio)

## Pri Movado Jean

Perros-Guirec, 5-2-1995

Mi tre ŝatas la ideon kiu instigis vin krei ASISTI. Neniam mi forgesos nian kunvenon en Brighton surherbe. Kiom da ĉeestantoj? Eble dek, dek du... La asocio kreskis. Mi ĝojas.

En La Chaux-de-Fonds ĵus okazis seminario okaze de la apero de la libro "Paco en ŝtormo", de Marc Rohrbach kiu fondis la Movadon Jean.

Gaby Tréanton (Bretonio)

# Granda Unueca Kredo

Feng Run, 95-01-08

Kun plezuro mi ricevis vian leteron kun Asistilo n-ro 15 en kiu troviĝas mia artikolo (...) Elkore mi konfesas ke mi mem ne kontentas pri mia artikolo, car ĝi ne bone montras mian ideon. Pli bone estas, ke nun mi jam finis la verkadon de "Granda Unueca Kredo", post kvin jaroj de mia penego. Mi ree menciis ke la diferenco disde aliaj religiaj sistemoj estas, ke GUK-o baziĝas sur moderna scienco, kiu ekzistas kiel rezulto de la eniro de scienca teorio en etikon ! GUK-o formas iun vivmanieron kaj soci-sistemon. Nun mi klopodas eldoni GUK-on : ĉu iu povas eldoni ĝin en broŝurformo, ĉar la manuskripto havas nur 90 paĝojn en tre malgranda formato.

Ĉu iu povus sendi al mi adreson en Francio de organizo kiu praktikas Esperanton kaj kun religia kaj kun politika celo ? Vi scias ke en mia lando tiaj informoj estas tre malmultaj !

Mi kredas ke nia kunlaboro estos fonto de nia sukceso !

Finfine mi prezentas min : mi estas 23-jara fraŭlo, instruisto, kiu praktikas Esperanton kaj iom la anglan, kaj kiu estus preta ĵeti sin en studadon de feliĉa vivo kaj paca mondo per politika procezo !

## Gukio

1. Gukio estas superŝtata organizo, kaj ne estas inter- aŭ trans-nacia organizo. Ĝi troviĝas en via koro ; ĝi troviĝas en la kosmo.

2. Politiko estas via vestaĵo, eĉ pli grava ol ĝi. Vi devas prizorgi ĝin, kiel vian korpon ! Klara estas la politika ideo de Gukisto, nome : elkonstrui Gukion, en kiu la ĉarto de superŝtata organizo superas konstitucion de ŝtato ; la paco vere realiĝas per pac-armeo.

3. Ĉe la rustinta animo de la homaro - kun la antikvaj religioj - post ŝalto de atoma prembuto, la fungaro de bomboj levigatas : la morto venus ! La homo pereus !

4. Ĉe malgranda loko en Gukio kie troviĝus nur malamo kaj instigo mi demandas Hitleron, la ĉefon de naziismo : " Kiom da Judoj vi mortigis, kara, diru al mi ? Kial vi tion faris ? " Li tuj fariĝus freneza kaj kolera : " Ne estas mi ! Mi ne mortigis ilin, la senkulpajn Judojn ; sed la senkompata homo en tiama mondo tion faris. Mi elvokis malamon, sed mi ne semis la semon de la malamo ! " Mi surpriziĝas pro lia vorto, kaj plu demandas : " Ĉu Guko punis vin, kara ? " - " Jes, ĉe senespero li finis mian nemaljunan vivon kun tiom da energio por vivo ; sed ĉefe, Guko punas la tutan homaron. Ne nur mi devus penti je Guko, ankaŭ la tuta homaro ! " Kiam mi foriris de la infero mi aŭdis la obtuzan vocon : " En mano de Guko teniĝas la glavo de justo. "

## Cent demandoj pri Guko

### II - Pri Gukisto

1. Kio estas Gukisto ?  
- *Adepto de Guko.*
2. Kiu povos fariĝi Gukisto ? - *Ĉiuj.*
3. Kiel oni povas fariĝi Gukisto ?  
- *Agu laŭ 5 tabuoj kaj 10 obeoj.*
4. Kio estas la teksto pri la 5 tabuoj, pri la unua ? - *Ne memmortigi sin.*
5. La dua ? - *Ne senracie paroli.*
6. La tria ? - *Ne ŝteli.*
7. La kvara ? - *Ne diboĉi.*
8. La kvina ? - *Ne uzi narkotikojn.*
9. Kio estas la teksto pri la dek obeoj : pri la unua ? - *Ami siajn najbarojn kaj malamikojn.*
10. La dua ? - *Labori kontraŭ la mizero.*
11. La tria ? - *Preĝi.*
12. La kvara ? - *Vivi en la hodiaŭo.*
13. La kvina ? - *Komp(letigi la ?) en havon, ne perdon.*
14. La sesa ? - *Halti(gi la) difektigon.*
15. La sepa ? - *Ĉiam juniĝi.*
16. La oka ? - *Ami la naturon.*
17. La naŭa ? - *Konturi (= limigi ?) sin.*
18. La deka ? - *Lerni almoz(don?)i.*
19. Kie kunvenas Gukistoj ?  
- *En Gukdomo.*
20. Kio estas Gukdomo ?  
- *Moskeo, katedralo, templo, hejmo aŭ ia ajn alia konstruaĵo.*
21. Kial konstrui Gukdomon ?  
- *Por kunlabori.*
22. Kion Gukisto povas labore fari ?  
- *Ĉion laŭ Guko.*
23. Ĉu Gukisto estas senmorta ? - *Jes.*
24. Do, kio estas morto ? - *Senespero en koro kaj neniigo de korpo.*
25. Kia estos la postmorto por Gukisto ?  
- *Paca kaj feliĉa en eterno.*
26. Kio estas la plej firma subteno de Gukisto ? - *La kredo pri Guko.*
27. Kio estas la vivo ?  
- *Donaco de Guko.*
28. Por kio Gukisto vivas ?  
- *Por ĝui vivon laŭ Guko.*
29. Kio estos la rekompenco obei Gukon ? - *Guklandon.*
30. Do, malsukceso. Kion tio signifas ?  
- *Venkon.*

# Nuntempaj spiritaj mesaĝoj

" Kristanoj, hebreoj aŭ mahometanoj  
Ni ĉiuj de Di' estas filoj."  
( Zamenhof )

El la nuntempaj spiritaj mesaĝoj, ofte fontas alvokoj al unuiĝo kaj paco. Tiuj ĉi alvokoj ricevas favoran eŝion de esperantistoj al kiuj ekzemple eku-  
menismo, bahaismo kaj Oomoto estas pli kutimaj ol al ordinaraĵoj homoj.

Laŭ la zamenhofa deziro, spiritaj mesaĝoj gvidas homaron al unuiĝo.

El tiuj mesaĝoj iuj, kiel bahaismo, celas la tutan homaron.

Aliaj celas nur kvazaŭan parencon de spirite proksimaj grupoj. Ekz-e  
Won-budhismo celas budhanojn kaj konfuceanojn dum mesaĝoj al Vasula,  
en Svislando, celas unuiĝon de ĉiuj kristanoj.

Aliaj mesaĝoj celas la jud-kristan-islaman unuiĝon, al kiu jam sopiris  
nia Majstro Zamenhof : vere, tiel proksimaj estas la fontoj de tiuj ĉi tri  
religioj, ke nur perversaj rivalecoj disigis ilin ĝis tragikaj malamikecoj.  
Feliĉe, al la citita alvoko zamenhofa, profetaĵo siatempe skandala, eŝis en  
la lastaj jardekoj almenaŭ du gravaj mesaĝoj :

1/ tiu de Medjugorje, en la eksa Jugoslavio, kie ekde 1981 ĉiumonataj  
alvokoj de Maria al fasto kaj kora preĝo revigligas la spiritajn valorojn de  
la tri abrahamaj religioj ;

2/ tiu de Arès apud Bordojo, en Francio, kie Michel Potay ricevis en  
1974 Jesuan mesaĝon konfirmitan tri jarojn poste per lumbastona teofanio.

La venonta artikolo klarigos la kernon de la jud-kristan-islama revelacio, tia kian la  
tiel diritaj Arès-pilgrimantoj ĝin ĉiutage spertas kaj laŭlegas en Biblio, Korano kaj  
Aresa Revelacio : fakte, diris la Kristo al Michel, "preĝi estas laŭlegi Mian Parolon  
por efektiviĝi ĝin" por "restarigi la tempon" de la Edena Paradizo.

**François Degoul** (sekvote)

(Pagita anonco)

(Intersanĝa anonco)

LA JAPANA BUDHANO  
N-ro 274 SEPTEMBRO-OKTOBRO 1994  
ENHAVO

紅葉の版画	石黒 漢子	1
Pri Atombombo en Nagasaki	TAKAHARA Ken	3
イスラーム名のあるお寺	小林 歌子	9
仏教辞典のための予備調査	西 泰宏	11
辞典項目提案	西 泰宏	12
お便りから		15
Ekskurso dum la UK	KOBAYASI Utako	16
Enkonduko al Sanskrito		19
Doŭgen parolis jene (3)	Okcidento	22
Recenzo	Okcidento	26
ASISTILO		28
目次, El Redakcio		29

TADAISI Ĉizuko

〒520 Honmaru-ĉo 6-19-403 Oocu-si Siga-ken  
poŝta ĝirkonto Kioto 0-45517

## La Kosmologio de Martinus

Logika vivklarigo kiu kondukas al  
pozitiva vivsinteno - kaj al pacaj  
kaj harmoniaj rilatoj inter homoj.  
Legu pri la kosmologio en la nova  
revuo KOSMOS.  
Petu senkoston provekzempleron  
ĉe Martinus-Instituto, Mariendals-  
vej 96, DK-2000 Kopenhago F,  
Danio. ☎ +45 3834 6280 - Fakso  
+45 3834 6180

Neŝia unuiĝo aŭ membreco

Ni ricevis  
la duan numeron de  
"Agape", bulteno  
pri parapsikologio,  
religioj, strangaj  
kaj misteraj aferoj,  
nekonata mondo... ,  
kaj am(ikec)o inter  
diversaj nacioj...  
(ul. Pulawska 3-11,  
PL-02515 Varsovio)

## Fondaĵo Patrino Tereza el Kalkuto

Homoj denaske damaĝitaj mense aŭ fizike,  
ne kapablas memstare vivi. La celo de tiu fon-  
daĵo starigita en Krakovo, en kiu tuj aktivigis  
lokaj esperantistoj, estas helpi ilin, ĉefe kons-  
truante "Domon de la familia protekto". Adreso:  
ul. Czarnowiejska 78/85 m.26, 30-049 Krakow.

# 2-a Internacia Seminario Esperantista

Pasko 1995 : de la 13-a ĝis 17-a de aprilo en Szombathely (sombathej), Hungario

Temo : *Vortoj kaj bonfaroj : Kion signifas en la ĉiutaga vivo la fidela sekvo de mia (religia) etiko ?*

Pasintan printempon en la unua Interreligia Seminario kun gojo ni spertis la plenumigon de nia esperoj. Bonvolo kaj akceptemo regis inter ni. Komunan lingvon parolante, kun malfermita koro ni proksimigis unu al la aliaj. Tamen ni sentis ke, surbaze de malsamaj kulturoj kaj religiaj kutimoj, ofte la samaj vortoj ne havis la saman signifon. Tial ni volas dedici ĉi-jare antaŭtagmezajn horojn al intersango de ideoj pri la bazaj esprimoj de diversaj religioj. Posttagmeze en pli-malpli grandaj grupoj ni deziras ekkoni la praktikon kiel ni vivas inter niaj "samideanoj" kaj kiel ni klopodas disdoni iom el la ricevita Lumo. La okcident-hungaria urbo Szombathely (85.000 logantoj) kun valoraj historiaj memoraroj, multaj diverstipaj kulturaj institutoj kaj bela ĉirkaŭaĵo ĉe la "piedo de la Alpoj", certe donas agrablan kadron al nia kunestado.

## Logkondicoj, kotizoj

La arango okazos en mezlerneja studenthejmo en bela parko, ne malproksime de la urbocentro. La 3/4-litaj cambroj trovigas en historia malnova konstruaĵo ; la 1- aŭ 2-litaj cambroj en la apude situanta nova parto de la studenthejmo. En ambaŭ lokoj duŝejoj kaj necesejoj estas ĉe koridore. La subaj kotizoj inkluzivas : 4 tranoktojn ; mangojn trifoje tage, laŭdeziro vegetare (unua servo : vespermango, 13-an de aprilo, lasta servo : tagmango aŭ luncpaketo la 17-an) ; fakan programon, ekskurson, informmaterialon

La prezoj estas donitaj en germanaj markoj. Ili ne inkluzivas asekuron ! B : Ĉeĥio, Hungario, Kroatio, Pollando, Slovakio, Slovenio. C : aliaj eksocialismaj landoj ; landoj de Afriko, Latina Ameriko kaj Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Respubliko). A : ĉiuj ceteraj landoj. Aligilo de A-landoj validas nur kun almetita konfirmilo pri la pago al Bernhard Westerhoff. B- kaj C-landanoj povas pagi surloke en markoj aŭ en hungaraj forintoj (laŭ la aktuala kurzo) depende de la elektita kategorio.

Prezoj: 3 aŭ 4-litaj cambroj: A 200, B 80, C 50 ; 2-litaj c.: A 215, B 85, C 55 ; 1-litaj c.: 230, B 90, C 60.

**Aligilo (Bonvolu skribi per latinaj presliteroj !):**

Familia nomo :

Persona nomo :

Adreso (strato, domo) :

(postkodo kaj urbo) :

Telefono (internacie) :

Lando :

Sekso : viro / virino Vegetarano : jes / ne Mi deziras logi kun :

Miaj apartaj deziroj, petoj (rilate la mangojn aŭ similaj) :

Aparteneco al eklezio, religia komunumo aŭ mondkoncepto :

Mi pretas kontribui al la programo per prelegeto pri :

aŭ gvido de laborgrupo, videobendo, sonbendo ktp. Precizigu :

## Pago

1/ A-landanoj. Mi pagas laŭ mia dezirata kategorio

por 3/4-lita cambro :

por 2-lita cambro :

por 1-lita cambro :

Mi samtempe kovras ĉiujn transpagajn kostojn. (Eventualan diferencon mi pagos surloke). Mi pagas al :

- la postgira konto de B. Westerhoff : 576858-605 BLZ 50010060 Postgirofiĉejo Frankfurt/Main

- aŭ la konto de ASISTI ĉe UEA : "asis-r"

Indiku ĉe ĉiu via pago : ISE 1995 !

Pri la pago mi sendas atestilon al Eva Farkas-Tatar, Dohany u. 36, H-1077 Budapeŝt (Hungario)

2/ B- kaj C-landanoj. Kiel partoprenanto el B- aŭ C-lando mi pagos surloke laŭ la kotiztabelo entute :

DEM (aŭ ekvivalenton en HUF).

Se hazarde mi ne povus partopreni kaj ne malaligos antaŭ la 20-3-1995, mi pretas pagi por organizaj kaj malmendaj elspezoj ekvivalenton de 25 DEM en nacia valuto al komisiito de la organizantoj.

La aligilon bonvolu resendi al Eva Farkas-Tatar. Sendo de precizigaj informoj estas garantiata.

Mi krommendas restadon en Budapeŝt por

noktoj inter la tagoj

kaj

en

pensiono por ĝis 40,-DEM en 2-lita cambro, aŭ 20,-DEM en studenta hotelo (por unu nokto, inkluzive matenmangon). La pagon mi promesas fari surloke.

Mi legis kaj akceptas ĉiujn indikitajn kondicojn

Dato :

Subskribo :

## La Papo denove parolis en esperanto ! Bonege : li kaj ni daŭrigu ! (Alvoko)

Post sia Kristnaska mesago, la Papo bondeziris al la mondo en 54 lingvoj, inter kiuj ankaŭ Esperanto. Ni sciu ke, antaŭe, okazis elekto inter 180 lingvoj. Pro financaj kialoj (ĉiu televida sekundo kostas sumegon por monda dissendo), finfine la nombro limigis je 54 lingvoj. Sekve, por ke estonte Esperanto estu denove elektata, nepras ke esperantistoj skribu amase al Vatikano por danki kaj esprimi la esperon ke Esperanto estos ree uzata. Sugesto : ni skribu ĉu mallongan leteron en Esperanto, ĉu kolektivian leteron, en Esperanto kaj en nacilingvo, kiun subskribu kaj esperantistoj kaj esperanto-amikoj. Ni neniam forgesu ke 126 aliaj lingvoj atendas por anstataŭi nian "karan lingvon" ! (Transsendita de G. Pirlet)

Eble al : Lia Sankta Mosto, p/a C. Sarandrea, Esperanto Redakcio, Radio Vaticana, 00120 Città del Vaticano. (Noto de la red.)

Directeur de Publication : Ch. Lavarenne, Le Presbytère, F-09800 Balagué.

Imprimerie : COREP, 125 Route de Narbonne, F-31400 Toulouse (Francio)